ESPERANTO

REVUO INTERNACIA

N-ro 629 (4)
Aprilo 1958

U. E. A. 1908 - 1958



Hector Hodler (1887-1920)
Fondinto de UEA

Jubilea Numero

Universala Esperanto-Asocio

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

esperanto

APRILO 1958

51a JARO

REVUO INTERNACIA N-RO 629 (4)

Fondinto: H. HODLER

Honora Redaktoro: HANS JAKOB

Cion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro:
MAG. W. AULD, Knockfarril, Thornside Road, Johnstone, Renfrewshire, Skotlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-C., Nederlando. Telefono: Rotterdam 128313. Ĝirkonto: 378964.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato

Bankisto de U.E.A.:

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1958): 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro 12,50 n.gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj:

1 paĝo 128,— gld $^1/_2$ paĝo 64,— gld $^1/_4$ paĝo 32,— gld $^1/_8$ paĝo 16,— gld $^1/_{16}$ paĝo 8,— gld

Anoncetoj pri korespondado:

0,10 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj. **Legantoj en 80 landoj.**

Estraro de U.E.A.:

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37, Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario 77, Grasmere Avenue Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban, Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Inĝ. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj, viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo,
Telefono: ARNold 90-81.

Enhavo

La fondiĝo de UEA 53
Kiel Hodler fondis UEA 54
La helpagado de UEA 1914-1918 . . . 55
Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj 57
Internacia Esperanto-Ligo 60
Konstruado de fortika UEA 61
„Montevideo" kaj ĝiaj sekvoj 65
UEA kiel organizanto de mondinformado . 66
La delegita reto 68
La apliko de moderna tekniko al nia agado 69

Rubrikoj

CED 70
La Juna Vivo 71
Internaciaj konkursoj 73
Ŝaka rubriko 74
Radio 74
43a U.K. 75
Oficiala informilo 76

Manuskriptoj por „Esperanto" devas esti klare tajpitaj sur unu flanko de la folioj, kun interlinia spaco, en perfekta Esperanto kaj en du ekzempleroj. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

LA FONDIĜO DE U.E.A.

La dokumentoj pri la fondiĝo de U.E.A. bedaŭrinde ne plu ekzistas. La detaloj pri la definitiva kreo de U.E.A. estis diskutitaj de Hektor Hodler kaj Théophile Rousseau en la urbo Bourg-en-Bresse, departemento Ain, Francujo, kien Hodler veturis por renkonti Rousseau. Ili kunvenis en tiea hotelo Terminus ĉe la stacidomo kaj tie ili metis la fundamentan ŝtonon de U.E.A.

En la maja numero de la revuo „Esperanto" de la jaro 1908 oni trovas en la Oficiala Informilo jenan sciigon:

„En la dato de la 28-a de aprilo 1908 ni ricevis ĝis nun el niaj delegitoj 59 respondojn al la cirkulero 3, el kiuj 57 aprobas la projekton de provizora regularo. Konsekvence la projekto de regularo estas akceptita kaj la

Universala Esperanto-Asocio

estas fondita. La sama nombro de delegitoj (59) ĝis nun rajtigis unuanime la Komitaton proponitan en cirkulero 3.

La Komitato de U.E.A.

konsistas el S-roj H. Bolingbroke Mudie, Prezidanto; H. Hodler, Vicprezidanto; komitatanoj: A. Carles, Th. Rousseau, Samuel Meyer, R. Mesny, Paul Blaise, Jakob Schmid, D-ro Whitaker."

Laŭ la provizora regularo, aperinta en „Esperanto" de la 12a de majo 1908, la celo de U.E.A. estas plifaciligi ĉiuspecajn rilatojn inter diverslingvanoj kaj krei fortikan ligilon de solidareco inter la membroj. En la regularo estis proklamita la principo de neŭtraleco rilate al religio, politiko kaj nacieco. La sola oficiala lingvo de la Asocio estas Esperanto, tia, kia ĝi estas difinita per sia literatura kaj teknika verkaro. En la lokoj, kie por tio ekzistas ebleco, unu el la membroj estas delegito, kiu libervole plenumas por la membroj diversajn praktikajn servojn. La nomoj kaj adresoj de la delegitoj aperas en la Jarlibro de la Asocio.

Tiuj fundamentaj principoj restis, kun malgrandaj modifoj, validaj ĝis la hodiaŭa tago.

En la komenco la Asocio havis nur individuajn membrojn, tio estas la unuopulo povis nur rekte aliĝi al U.E.A., do ne pere de sia loka grupo aŭ landa societo. Nur en la jaro 1933, surbaze de la t.n. Interkonsento de Kolonjo, U.E.A. fariĝis federacio de landaj asocioj, sed al ĝi plue povis aliĝi individuaj membroj. Tiu principo larĝiĝis poste ankaŭ al la fakaj internaciaj organizaĵoj, tiel ke hodiaŭ U.E.A. konsistas el landaj asocioj kaj individuaj membroj, dum la fakaj asocioj povas aliĝi aŭ laŭ specialaj kondiĉoj kaj reprezentiĝi en la Komitato, aŭ fari kun la Asocio kontrakton pri kunlaboro.

La nuna organizformo de U.E.A.

Laŭ la nova Statuto, **la celoj** de U.E.A. estas: disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto; plifaciligi ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj sen ia ajn diferenco pri ilia nacieco, raso, religio aŭ lingvo; kreskigi inter la membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj; zorgi pri la kunagado de esperantistaj organizaĵoj; krei internaciajn servojn, uzeblajn de ĉiuj homoj, kies intelektaj aŭ materiaj interesoj transiras la limojn de ilia nacia aŭ lingva teritorio; okazigi la universalajn kongresojn de Esperanto kaj aliajn kongresojn kaj konferencojn.

U.E.A. estas **neŭtrala** rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj problemoj. Tamen, la Statuto eksplicite emfazas, ke la respekto de la Homaj Rajtoj estas esenca kondiĉo por la laboro de U.E.A. Sekve, kvankam politike neŭtrala, U.E.A. akceptis kiel unu el la fundamentaj principoj de sia agado la respekton de la Homaj Rajtoj kun ĉiuj konsekvencoj, kiujn entenas tiu principo. La neŭtraleco de U.E.A. neniel signifas pasivecon rilate al la fundamentaj Rajtoj de la Homo.

La larĝeco de la nuna Statuto ebligas la aliĝon de ĉiu neŭtrala landa asocio, de ĉiu faka internacia Esperanto-organizaĵo kaj de ĉiu individuo. La fakaj internaciaj asocioj, se ili ne deziras aliĝi, povas fari kontrakton pri kunlaboro. Same tiel la neneŭtralaj Esperanto-organizaĵoj kaj la landaj fakaj societoj (la lastaj kun la aprobo de la aliĝinta landa asocio) povas fari kontrakton pri kunlaboro kun U.E.A. Neesperantistaj organizaĵoj povas esti akceptitaj kiel apogantaj laŭ specialaj kondiĉoj. Ili ne havas ian ajn rajton en U.E.A. Same tiel la unuopuloj, neesperantistoj, povas fariĝi apogantoj de U.E.A. pagante unufojon por ĉiam difinitan sumeton. Kompreneble, ili ne estas kalkulataj kiel membroj kaj havas neniun rajton en la Asocio.

Fine de 1957 U.E.A. konsistis el 25 landaj asocioj, 1 faka organizaĵo (ISAE) kaj entute 27.138 membroj individuaj kaj asociaj (inter la asociaj membroj estas kalkulataj nur tiuj, kiuj ne estas individuaj membroj de U.E.A.; ne estas kalkulataj la membroj de la fakaj asocioj). Plue, U.E.A. havas kontrakton pri kunlaboro kun 13 fakaj kaj specialaj internaciaj organizaĵoj. Tiamaniere UEA estas hodiaŭ ankaŭ el vidpunkto de la aliĝintaj asocioj, nombro de membroj kaj fakaj organizaĵoj kontrakte kunligitaj, pli potenca ol iam antaŭe en sia tuta 50-jara historio.

La **Komitato** de U.E.A. konsistas el komitatanoj A) elektitaj de la landaj kaj aliĝintaj fakaj asocioj; komitatanoj B) elektitaj de la delegitoj kiel re-

prezentantoj de la individuaj membroj; komitatanoj C) alelektitaj de la komitatanoj A) kaj B) ĝis unu kvarono de sia nombro. La Komitato de U.E.A. respegulas la konsiston de la Asocio kaj ĝi estas taŭga sintezo de la principo supernacia kaj principo nacia. Ĉiuj komitatanoj havas absolute egalajn rajtojn. La Komitato, kiel supera organo de U.E.A., fiksas la ĝeneralan agadon, donas direktivojn al la Estraro, decidas pri la buĝeto, kontrolas ĝian efektivigon, decidas pri ĉiuj regularoj, pri la aliĝo aŭ eksigo de landaj kaj fakaj asocioj, aprobas la kontraktojn kun la fakaj asocioj, fiksas la laborplanon, kiu estas deviga por ĉiuj organoj de la Asocio kaj por la tuta membraro. La Komitato nun konsistas entute el 54 komitatanoj kaj ĝi estas la plej granda en la tuta historio de U.E.A.

La **Estraro,** elektata ĉiun trian jaron de la Komitato, konsistas el prezidanto, unu aŭ du vicprezidantoj, la ĝenerala sekretario kaj du ĝis kvar pliaj estraranoj. La Estraro plenumas la decidojn de la Komitato kaj tiujn funkciojn, kiujn donas al ĝi la Statuto kaj regularoj. La nuna Estraro konsistas el 6 personoj, kiuj respondecas pri diversaj fakoj. La Estraro nomas la direktoron de la Centra Oficejo kaj aprobas liajn nomigojn de la oficistoj. Tiamaniere efektiviĝas ĉeno de respondecoj: la C.O. respondecas al la Estraro, la Estraro al la Komitato, la Komitato al la elekta korpo, nome al la aliĝintaj asocioj kaj al la individuaj membroj. Sed aliflanke ekzistas same tiel forta ĉeno de disciplinita plenumo de ĉiuj decidoj, faritaj laŭ la Statuto kaj diversaj regularoj, de ĉiuj organoj de U.E.A. laŭ iliaj kompetentecoj kaj respondecoj. Sen tiuj du fundamentaj principoj de demokrate organizita organismo, kia estas U.E.A., ne estas imagebla kia ajn laboro. La malobeo de tiuj principoj kondukus rekte al anarkio kaj disfalo. Laŭ la nova Statuto de U.E.A., ĉiuj kunsidoj de la Komitato estas publikaj kaj ilin povas ĉeesti ĉiu membro. Ankaŭ la protokoloj ne plu estas konfidencaj, kiel sub la malnova Statuto, sed publikaj. Tiu nova principo aldonas plian elementon de demokrata kontrolo. Por la plua progresado de U.E.A. la rigora observado de tiuj principoj estas esenca. Forta respondeco de ĉiu organo al la supera, de ĉiu membro de iu organo al la koncerna organo, unuflanke, sed aliflanke rigora plenumo de ĉiuj decidoj de la plimulto (simpla aŭ kvalifikita) laŭ la Statuto, kun samtempa kontrolo de laboro fare de la membraro, prezentas la nepran, absolute netuŝeblan antaŭkondiĉon de efika laboro kaj de daŭra, energia, senkompromisa irado antaŭen.

I. L.

Kiel Hodler fondis UEA

Karikatura poŝtkarto de 1908, flaviĝinta post duonjarcento, montras la 20-jaran junulon Hector Hodler kun nigra barbeto, gvidanta reton de telegrafaj fadenoj al la tuta mondo. Prava kaj trafa bildo, ĉar ni ja ŝuldas al la klarvido kaj persistemo de tiu nobla junulo la vivan bazon de nia movado kun ĝiaj delegitoj kaj fakaj servoj.

Li estis ne nur organizanto, sed filozofo de nia movado, kaj UEA ekfloris el lia ĉefa penso: nia lingvo ne estas propono, sed ilo tuj uzebla kaj uzinda. Ju pli ĝi servos, des pli ĝi vivos.

Mi konis Hodler jam de frua knabeco, ĉar ni kune sidis en la sama gimnazia klaso kvankam li estis du jarojn pli aĝa. Tiun altan, malgrasan knabon, fieran kaj silenteman, mi ĉiam admiris ĉar li ŝajne legis ĉion, sciis ĉion kaj komprenis ĉion. Aparte kaj sendepende ni estis lernintaj Esperanton el trovitaj broŝuroj kaj, kiam ni surprize malkovris la fakton, ni fariĝis amikoj nedivideblaj, ĉiam kune, ĉiutage interŝanĝante librojn kaj ideojn. En 1903 ni kune fondis la gazeton „Juna Esperantisto" kaj korespondis kun D-ro Zamenhof, Rektoro Boirac, Profesoro Cart, kaj amuze lernis artlingvojn kiel Bolak, Idiom Neutral ktp. por kompari. Jam ni sentis ke la ĉefa supereco kuŝis en la viva karaktero de Esperanto kaj en la idea inspiro, kiun blovis en ĝin la genia kreinto aŭ pli ĝuste „iniciatoro", kiel Zamenhof nomis sin laŭ tute korekta scienca kompreno kaj tipa modesteco persona.

En 1905 mi veturis al la Unua Kongreso en Boulogne-sur-Mer (ne piediris, spite legendo) kaj organizis kun Hodler la duan Universalan Kongreson en Genève en 1906. Mokema knabo kun kritika ironio, li multe ridis pri la naiveco de solenaj urbestraranoj, kiujn ni devis necese viziti, kaj ankaŭ pri la surprizo de niaj gimnaziaj instruantoj, kiam ni petis forpermesojn, prezentante kunvokleterojn sur oficiala papero.

Tiam la patro de Hodler, genia pentristo, estis ankoraŭ tre kritikata kaj malriĉa. Subite venis famo kaj la sukceso financa. Kiam ni finis la gimnazion en 1907, la filo dediĉis sin tute al nia afero kaj reprenis de Paul Berthelot la gazeton „Esperanto". Ni adiaŭis ĉagrene, ĉar mi forvojaĝis al Anglujo kaj Usono por fari kursojn kaj prelegojn antaŭ ol komenci la universitaton en Parizo.

Ne nur pri la naiveco de solenaj politikistoj ŝercis Hector Hodler, sed ankaŭ pri la iluzioj de multaj esperantistoj, kiuj fidis je publikaj aproboj aŭ promesoj de famuloj por sukcesigi Esperanton. Lin naŭzis la pretendo de S-ro Couturat kaj de lia „Delegacio por la elekto de helplingvo", kiu imagis ke ia komitato de grandnomoj sufiĉus por oficialigi mondlingvon kaj ĝin instruigi en lernejoj. Li ankaŭ ridis pri tiaj membroj de niaj grupoj, kiuj ne sciis

Prezidintoj de UEA 1



Harold Bolingbroke Mudie (1880-1916)

Prezidanto 1908-1916

mem la lingvon. Li fariĝis ofte senpacienca pri tiu teoria, propona flanko de nia movado, kaj deziris organizon por uzi la lingvon kaj pruvi per marŝo la marŝadon, laŭ la greka filozofo.

Kvankam mi vizitis en Washington prezidanton Theodore Roosevelt en 1908 por diskonigi nian aferon en la usona gazetaro, mi konsentis kun Hodler ke uzo eĉ pli gravas ol propagando, kaj, reveninte Eŭropon, mi ĝojis pri la unua kunveno de UEA dum nia kvara Universala Kongreso en Dresden, kiam D-ro Zamenhof gratulis Hodler kaj deklaris ke „UEA estas sendube la plej grava institucio en nia movado". Talentaj viroj kiel la francoj Rousseau kaj Carles kunlaboris por starigi la sistemon de niaj lokaj „konsuloj", pli poste „delegitoj", kaj baldaŭ Eduardo Stettler kaj Hans Jakob helpis Hodler por reguligi akuratajn kontojn kaj aperigi ĉiam pli riĉajn jarlibrojn. Ili fariĝis la ĉefverkoj de Hans Jakob.

Dum la unua mondmilito la centra oficejo povis helpi kaj informi milojn da malfeliĉaj familioj sen novaĵoj pri parenco for en milito aŭ en kaptitejo. Ĉar la sidejo estis tempe en Bern kaj denove en Ĝenevo, ĉiam en neŭtrala lando, tiu homhelpa agado montris la bonkorecon de Hector Hodler kaj de lia sindona sekvanto Jakob. Sub lia ironia kaj ŝajne pesimisma aspekto, Hodler ĉiam kaŝis profunde homaran spiriton. Dum la unua mondmilito li verkis memorandon pri la veraj kaŭzoj de konfliktoj inter nacioj. La rimedoj, kiujn li proponis, celis organizon tutmondan super la nunaj ŝtatoj. Tridekdujara, li mortis en 1920 post kelkaj jaroj de feliĉa edzeco, sed antaŭ ol li povis ekzameni la spertojn de la Ligo de Nacioj kaj de la Unuiĝinta Naciaro, ne la lastaj sur tiu kampo. La malsano, kiu lin forportis estis parte frukto de malriĉeco dum la infanaj jaroj. Poste lin dum jaroj ĉagrenis la disputoj kaj la ĵaluzo kontraŭ UEA. Nun ĝi fariĝis la strukturo mem de nia movado kaj nia danka memoro flugas al la kuraĝa firma junulo, kiu ĝin elpensis kaj kreis. Al lia ideoj kaj al lia persistado ni ŝuldas grandparte la vivon de nia lingvo.

Edmond Privat

LA HELP-AGADO DE UEA 1914-1918

Nur malmultaj el vi, karaj legantoj, povas revivigi antaŭ si la strečan semajnon inter julio—aŭgusto 1914. Ĉu paco, ĉu milito? nur tiu ĉi demando okupis la homojn, nerveme legante gazetojn, diskutante la komunikojn sinsekvantajn senhalte. Febra vivo en Ĝenevo, urbo se ne kosmopolita tiutempe, tamen internacia, la eksterlandanoj malcertaj kaj timigataj kurantaj al la bankoj, preparantaj valizojn; ĉie ekscitiĝo, nervozeco.

En la Centran Oficejon de UEA, 10 rue de la Bourse, ankaŭ penetris la nervozeco. Ĉu iri al Parizo, al la DEKA kongreso, aŭ atendi ankoraŭ por ne riski esti blokata? Je la 28a de julio la Direktoro de UEA, S-ro Hodler, telegrafis al Generalo Sébert en Parizo, komunikante la zorgon kaj timon de alilandaj Esperantistoj ekveturi. Venis respondo de la Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj, trankviligante kun espero, ke katastrofo estas certe evitata. Se male, la Franca Registaro zorgos, ke fremdaj kongresanoj troviĝantaj jam en Francujo povu atingi hejmlandon.

Belega optimismo de la Franca Ministerio, ĉar la situacio rapide ŝanĝiĝis. Prudente, ni en Ĝenevo avertis telefone samideanojn pretajn ekveturi, *atendi* unu tagon. Nia prudenteco praviĝis. Sabato je la unua de aŭgusto, ĝenerala mobilizo milita en Svislando. Unu militdeklaro sekvis la alian kaj la DEKA Kongreso de Esperanto staris sur la papero por ĉiam. Tiuj kelkaj linioj servas por kompreni igi situacion tiutempan en la centro de UEA, en Ĝenevo.

Dum la semajno antaŭ la militdeklaro, la centro de UEA havis diversajn vizitojn interesajn de kongresanoj aŭ personoj loĝintaj en Francujo kaj celantaj atingi hejmlandon per vojo plej sekura. Inter tiuj vizitoj estis konata serba samideano,

pioniro en sia lando, Dragomir Andonović, universitata profesoro. Altkreska, tipa serbo, li tute ne estis emociita. Je nia demando, ĉu li ne timas forpasi sur batalkampo, li filozofie respondis: *„Sciu, ke ne ĉiu kuglo trafas"*. Simpatia homo, kiu bedaŭrinde post la milito iom apartiĝis de la movado.

La unua semajno post la militdeklaro, la Centra Oficejo de UEA estis kvazaŭ dezerta, tri oficistoj forlasis Ĝenevon. Verdire oni ne sciis kion fari, do ni atendis. La vivo normaliĝis kaj ni decidis antaŭvidi reaperigon de la revuo por jarkomenco. Ĝenerale regis ja la ideo ke la milito daŭros kelkajn monatojn, konforme al la deklaroj de militistoj profesiaj kaj de ekonomiistoj. Ambaŭ eraris.

Je la fino de aŭgusto okazis decida afero. Venis al la Oficejo korespondaĵo de nia Delegito en Nürnberg, D-ro *Orthal,* kiu petis ke ni informiĝu pri personoj en Francujo, germaninoj. Tuj ĉe la militdeklaro poŝtservo inter militantaj landoj ĉesis — eĉ ne tra nemilitanta lando. Plie eksterlandanoj de „malamika" lando estis arestataj kaj loĝigitaj en koncentrejo, loko de homa humiligo. Ricevinte tiun ĉi demandon ni faris la neceson rapide kaj jen sekvis pluvo de demandoj similaj. Ideo naskiĝis... Kial ne meti nian aparaton, nian avantaĝon sidi en neŭtrala Svislando al la viktimoj de l' milito? Unua paŝo: cirkulero al la Delegitoj de UEA kun teksto por la taga gazetaro. Nek H. Hodler nek mi antaŭvidis la sekvon. La teksto estis:

Ĉar la militagoj okazis preskaŭ subite, multaj personoj troviĝis surprizataj en la malamikaj landoj kaj ne plu havis la eblon, korespondi kun siaj parencoj kaj amikoj.


Por laŭeble helpi ilin, la Centra Oficejo de Universala Esperanto-Asocio, sidanta en Genève, jus informis siajn delegitojn, ke ĝi volonte servos kiel peranto por la interŝanĝo de privataj korespondaĵoj inter la militantaj landoj. La leteroj estas ricevataj ĉe la Ĝeneva Oficejo, el kie ili estas transdonataj al la adresato, se bezone post traduko. Estas akceptataj nur la nefermitaj korespondaĵoj, havantaj absolute nenian politikan aŭ militistan karakteron. La personoj, kiuj deziras uzi tiun servon, nun en plena funkciado, estas invitataj, sendi korespondaĵon kun du internaciaj respondkuponoj al Universala Esperanto-Asocio, 10 Rue de la Bourse, Genève, Svislando."

La Delegitoj de UEA tuj komprenis la aferon kaj en miloj da gazetoj aperis tiu ĉi informo, tradukita de la Delegitoj. Oni batis du muŝojn per unu frapo: *Helpi* kaj samtempe *konigi* la organizaĵon de Esperanto.

Tiu ĉi simpla informo, kiu hodiaŭ ŝajnas iom naiva, transformis nian Oficejon. De septembro ĝis decembro 1914, oni kredis sin en poŝtoficejo. Granda longa tablo de la Librejo kovriĝis ĉiutage per korespondaĵoj el Aŭstrio-Hungarlando, Britujo, Francujo, Germanujo, pli poste Balkano kaj Ruslando.

La plimulto de la korespondaĵoj estis por simpla transsendo, posta ricevo de respondo kaj resendo.

Prezidintoj de UEA . . . 2



Hector Hodler (1887-1920)
Vicprezidanto 1909-1917, Prezidanto 1919-1920

Sed jam post kelkaj semajnoj venis informpetoj specialaj, monsendo, informiĝo pri personoj ne respondintaj, militkaptitoj, rehejmigo de civiluloj k.a. La Direktoro de UEA, H. Hodler, komisiis la verkinton de nuna teksto, organizi plejbone la tuton. Rapide la procedado estis sistemigata. Ekzameno de la korespondaĵo kaj dispartigo laŭ kategorioj: Simpla transsendo; Specialaj servoj; monsendo; militistoj; civilkaptitoj; rehejmigo de civiluloj; militkaptitoj, malaperintoj kaj rilatoj kun la respektivaj instancoj civilaj aŭ militaj; rilatoj kun la Ruĝkrucaj organizaĵoj; Ruĝa Kruco, Ĝenevo; Variaĵoj.

Ni devis voki helpon kaj nature bonvolan. Pluraj ĝenevanoj, inter ili nia Delegito, Universitata profesoro Mallet kaj ties fratino, Sinjorino Manuel, reveninta de Ruslando kun edzino, k.a. Plie venis helpi, Esperantistoj revenintaj el Francujo, nepovintaj atingi hejmlandon, inter ili ni citu Edvardon Wiesenfeld (Lonkopolanski) el Varsovio, pliposte ĉeĥo, Zdenko Rohla, ĉiuj valoraj helpoj por la korespondaĵoj en slavaj lingvoj. Regis tiutempe granda sento de helpemo kaj ne mankis bonvoluloj, ofte ne kutimitaj je oficeja laboro tiaspeca, kio necesigis formi ilin.

Kelkaj ciferoj ilustras la amplekson de la laboro: Aŭgusto 1914; Korespondaĵoj ricevitaj 181, septembro 254, oktobro 1532, novembro 3735, decembro 7181. La sumo en 1915 estis 97415 ricevitaj-senditaj kune. 1916: 31200.

La simpla leter-transsendo postulis kontrolon. Slipo kun nomo de la personoj, datoj de ricevo-forsendo. Tio ŝajnas komplika, ideo irinta el kapo de nekuracebla burokrato. Sed ĝi montriĝis treege valora, tutsimple ni estris la materion.

Tiu ĉi servo konatigis nin kun sortoj kelkfoje tragediaj. Pripensiga la interŝanĝo de leteroj inter geamantoj, fianĉo kun fianĉino, de unu malamika lando al alia. Tio rilatis precipe Francujon, Ger-

manujon, Britujon. Ni principe ne interesiĝis pri la enhavo de la korespondaĵoj, kiam montriĝis ĉe la dispartigo je kio temas. Ofte la ge-amantoj sin turnis al ni demandinte tion aŭ alion, sendon de objekto, k.t.p. Kelkfoje ni devis komisii Delegiton por esplori kial ,,kliento'' ne respondis. Interveno de la gepatroj, rompi rilaton kun persono el ,,malamika'' lando, leteroj plorplenaj, disiĝo. Mankas tie ĉi la loko por citi tipajn servojn, plenumitajn dank' al la Delegitoj. Valoran helpon ni trovis en Charles Brunet, D en Bordeaux (sidejo de la Franca Registaro), kiu per rilato kun koncerna servo oficiala, povis rapide nin informi pri militkaptitoj germanaj, reciproke al sama servo farita en Dresden sub la gvido de Konsulo Finnlanda, Karl von Frenckell, kiu ankaŭ per rekta rilato povis rapidege havi informon. Je centoj sumiĝis la kazoj, metode prilaboritaj.

Dum la unuaj monatoj de la milito, la Centra Oficejo de UEA estis vera abelujo. Tio estas kompreneble el tio, ke la Internacia Ruĝa Kruco sin okupis nur pri militistoj, ke neniu alia organizaĵo disponis la reton de servopretaj homoj — *Delegitoj*. Koncentriĝis tiam en la UEA Centro kapabloj kaj spertoj, elementoj decidigaj por sukcesi. Se hodiaŭ oni povus ion riproĉi al la gvidantoj, tio estas ke ni ne sufiĉe ekspluatis tiun ĉi grandan servadon. Certe estas ke miloj da personoj konatiĝis pri Esperanto (ni presigis informfoliojn plurlingvajn sur malpeza papero, sendatajn kun la korespondaĵoj).

Servinte al ne-esperantistoj ni tamen ne forgesis niajn samideanojn. Estas ankoraŭ nun inter aktivaj Esperantistoj tiaj kiuj trovis helpon, konsilon kaj kuraĝigon de UEA. Laŭ iniciato de Hans Jakob, UEA preparis por Kristnasko 1916 sendaĵojn al esperantistaj militkaptitoj, kutime dukilograman, kelkfoje kvinkilograman sendaĵon. Amuza aspekto de la salono de l' Centro de UEA. Centoj da kilogramoj de speciala pano, konservaĵoj, ĉokolado, tabako, cigaredoj, vera spicejo. Ni preferis mem prepari tiujn sendaĵojn pro bona kaŭzo. Foriris inter 15a de novembro kaj 15-a de decembro 1916, kelkcentoj da pakaĵoj, laborego, volonte plenumita de ni. Ĝis Siberio ni sendis tiajn, nur malmultaj perdiĝis. La nombro de la militkaptitoj esperantistaj grandiĝis, sinsekve aperis la nomoj en la revuo ESPERANTO.

Super ĉio staris la konvinko, ke milito finiĝos kaj ke necesas prepari la grundon por la estonta paco. Tiel ankaŭ ni en UEA komprenis la devizon de la Ruĝa Kruco:

INTER ARMA CARITAS

Hans Jakob

Inter la aliaj, kiuj sindone laboris dum tiu tempo, menciinda estas ankaŭ nia sola tiama Delegito en Galicio, s-ro Stanislaw Rudnicki, nun en Varsovio.

Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj

La Unua Universala Kongreso en Boulogne-sur-Mer en 1905 deziris oficialigon de Esperanto sur du kampoj: ĝin akceptigi kiel ,,klaran'' lingvon en internaciaj telegrafaj rilatoj kaj ĝin enkonduki en lernejojn. La unua celo (propono Ducros) ŝajnis tiam al multaj tro frua, ĉar necesis konstati sufiĉe vastan uzon de la lingvo antaŭ ol tion konfirmigi leĝe. En telegrafa teĥnika nomado, la vorto ,,klara'' signifas ,,ne koda'', ordinara, kiel la nacilingvoj aŭ la latina La dua celo (propono Privat) ŝajnis tiam pli proksime atingebla. La faktoj poste montris la malon.

Per siaj kongresoj, per sia gazetaro, kaj per UEA kun ĝia adresaro de delegitoj, la internacia lingvo eniris rapide sur la kampon de konstanta uzado parola kaj skriba. Post la unua mondmilito fondiĝis la Ligo de Nacioj por akceli pacan organizon de la mondo, kaj, ĉar ĝi sidis en Ĝenevo, ni decidis proponi al ĝi la du dezirojn de la Bulonja Kongreso. Ni komencis per la dua, kio estis eraro, ĉar la lernejaj aferoj estis ege delikataj kaj ni baldaŭ vidis kiel akre la ĉefaj registaroj kontraŭbatalis ĉian rekomendon, eĉ por lecionoj pri la Ligo de Nacioj, al geknaboj. Mi memoras koleran intervenon de la franca delegito kontraŭ tia rekomendo, ĉar ĝi tuŝis la sendependecon de la publika instruado en lia lando kaj ,,minacis la patrujaman edukadon de la infanoj per internaciismo''. Franca Ministro de Instruado estis tiam s-ro Léon Bérard, kiu ĵus malpermesis ĉiajn esperanto-kursojn en la lernejaj domoj.

Esperante antaŭvideblan ŝanĝon de registaro en Parizo, ni tamen verkis tekston de propono ĉe la Ligo kaj sukcesis ricevi la subskribojn de la jenaj delegitoj: Lafontaine (Belgujo); Wellington Koo (Ĉinujo); Lord Cecil (Sudafriko); Schanzer (Italujo); Zoka (Persujo); Beneŝ (Ĉeĥoslovakio); Restrepo (Kolombio); Octavio (Brazilo); Dores (Haiti); Nawanngar (Brita Hindujo); Huneus (Ĉilio).

La propono esprimis la deziron, ke ĉiu infano en la mondo lernu almenaŭ du lingvojn, la sian kaj la internacian, kaj konstatis, ke jam en kelkaj landoj Esperanto estas instruata nedevige aŭ prove. Ĝi petis, ke la ĝenerala sekretario de la Ligo preparu raporton pri la rezultatoj jam atingitaj sur tiu ĉi kampo.

La proponon ekzamenis la Dua Komisiono (pri teĥnikaj aferoj) kaj ĝi rekomendis al la plena kunveno komisii la Sekretarion prepari enketon pri la instruado de Esperanto en la lernejoj. Belga sena-

tano Lafontaine, malnova amiko nia, prezentis al la lasta plena kunveno la rekomendon de la komisiono, sed lin tuj interrompis la Prezidanto Hymans, ankaŭ belgo, per ŝerca moko. Tiam leviĝis la franca delegito Hanotaux, fama diplomato kaj Akademiano, kiu proponis ne diskuti tian aferon, ĉar ,,ekzistas jam internacia lingvo, la franca, universala en la tuta mondo de la penso". La prezidanto tuj voĉdonigis pri la prokrasto de la diskuto kaj, post iom da konfuzo, li deklaris la prokraston decidita.

Estis granda bato, sed ni ne perdis kuraĝon, speciale ĉar la ĝenerala vicsekretario de la Ligo, japana senatano Inazo Nitobe, vizitis nian kongreson en Praha kaj prezentis oficialan raporton al la Ligo pri siaj favoraj impresoj. Li kaj ministro Beneŝ partoprenis vespermanĝon de UEA kaj kuraĝigis nin en Praha dum aŭgusto 1921.


Ĉe la dua Kunveno de la Ligo, en septembro 1921, la samaj delegitoj denove subskribis proponon por komisii la ĝeneralan sekretarion entrepreni la enketon, kaj plie subskribis ankaŭ; Enckell (Finnlando); Adatci (Japanujo); Escalante (Venezuelo) kaj Ionescu (Rumanujo)

La proponon subtenis Lord Cecil ĉe la Komisiono de la Tagordo, kiu rekomendis, ke la enketo estu farata, kaj ke la rezulta raporto estu diskutata de la sekvantjara kunveno (tria) de la Ligo en 1922. Tion decidis la Plena Kunveno sen kontraŭstaro. Dum la vintro 1921 la ĝenerala sekretario dissendis cirkuleron al ĉiuj membro-ŝtatoj de la Ligo por demandi ĉu Esperanto estas iel instruata en iliaj lernejoj. Li petis min helpi s-ron Nitobe por redakti la raporton laŭ la ricevotaj respondoj, kaj mi vizitis en Anglujo kaj en Italujo (Milano) elementajn lernejojn, en kiuj komenciĝis provaj kursoj same kiel en Ĝenevo.

Kun la afabla kunlaboro de Profesoro Pierre Bovet kaj de la Instituto J. J. Rousseau (pri pedagogia scenico) ni organizis en Ĝenevo Internacian Konferencon pri la instruado de Esperanto en la lernejoj, kiun partoprenis instruistoj el 28 landoj kaj oficialaj delegitoj de 16 registaroj. Ĉar tio helpis lian enketon, la Ĝenerala Sekretario de la Ligo de Naciaj, Sir Eric Drummond, invitis la konferencon kunsidi en la Palaco de la Ligo kaj salutis mem per danka bonvenparolado. La diskutoj alportis tre interesan materialon pri la spertoj faritaj laŭ pedagogia vidpunkto, kaj la registaraj respondoj havigis la precizajn datojn kaj ciferojn. Sur la bazo de ambaŭ fontoj estis redaktita la raporto de la Ĝenerala Sekretario al la Ligo. Poste ĝiaj oficialaj eldonoj angle kaj france disvendiĝis milope. Tradukoj en aliaj lingvoj aperis private.

La raporto konkludis, ke la deviga instruado dependas de eventuala interŝtata interkonsento kaj, pri uzo telegrafa, konstatis ke jam dek ŝtatoj deklaras sin pretaj doni al Esperanto la rangon de ,,klara" lingvo, internacie uzata. Ĝi fine konstatis,

Prezidintoj de UEA . . . 3



Eduard Stettler (1880-1940)

Prezidanto 1920-1924, 1928-1934

ke ,,la uzo de Esperanto ŝajnas disvastigi spiriton de internacia solidareco tute konforma je la celo de la Ligo de Nacioj".

Dum la tria Ĝenerala Kunveno de la Ligo dum aŭtuno 1922, la raporton ekzamenis la Kvina Komisiono (pri sociaj aferoj). Ĝiajn konkludojn subtenis Prof. Gilbert Murray, la fama helenisto el Oxford, kaj kontraŭbatalis F-ino Forchhammer, dana idistino, kaj s-ro Rio Branco, brazila ambasadoro, kiu atakis Esperanto kiel ,,lingvon de mizeruloj kaj komunistoj", eĉ private presigis kaj disdonis sian paroladon. La franca delegito, senatano Reynald, deklaris ke li ricevis instrukciojn kontraŭ aprobo al ĉia mondlingvo krom la franca, kaj proponis resendi la tutan aferon al la ,,Komisiono por intelekta kooperado", la antaŭularo de UNESKO. Delegitoj de Finnlando, Persujo, Ĉinujo, Bulgarujo, Japanujo, esprimis timon, ke la celo de la propono estis enterigi la tutan aferon. Post tritaga, ofte pasia, diskutado, la kvina komisiono akceptis kompromison: unuflanke resendon de la lerneja demando al ,,Intelekta Komisiono", kaj aliflanke oficialigon de la raporto kun kelkaj ŝanĝoj kaj aldono de la fervora raporto de la Pariza Komerca Ĉambro pri Esperanto, redaktita de ĝia prezidanto, S-ro Baudet.

Dum la plena kunveno Lord Cecil subtenis la oficialigon de la raporto, kiun li konsideris kiel

„grandan sukceson por Esperanto", kaj li konsilis al la esperantistoj kuraĝe daŭrigi sian laboron... „La Intelekta Komisiono devos memori, ke mondlingvo ne estas bezonata nur de intelektuloj, sed antaŭ ĉio de la popoloj mem".

Tiun memorigon oni ne atentis kaj, per 6 voĉoj kontraŭ 1 kaj 3 sindetenoj, la Intelekta Komisiono decidis *ne* studi la demandon pri Esperanto en lernejoj: „Ĝi ne neas la praktikajn avantaĝojn havigeblajn per tutmonda adopto de helpa lingvo artefarita, sed ĝi opinias, ke ĝia penado devas antaŭ ĉio celi favoradon al la studo de la vivantaj lingvoj kaj fremdaj literaturoj, ĉar tiu studado estas unu el la plej potencaj rimedoj de intelekta kaj monda reproksimigo inter homoj diversnaciaj, kio estas la idealo mem de la Ligo de Nacioj."

La lego de tiu rezolucio tri tagojn poste dum la Esp. Kongreso en Nürnberg (aŭgusto 1923) kaŭzis laŭtan ridegon ĉe la grandamasa aŭdantaro. Kiam kunsidis en Ĝenevo la Kvara Ĝenerala Kunveno de la Ligo de Nacioj, Prof. Jacques Bardoux (Francujo) alvenis kun la instrukcio uzi la negativan respondon de la Intelekta Komisiono por „definitive elpuŝi Esperanton". Li do prezentis ĝin en la Kvina Komisiono sub formo de Liga rezolucio rekomendanta la studon de fremdaj lingvoj prefere al lerno de arta helplingvo. Sed alinaciaj delegitoj tuj protestis. Pluraj klarigis al li, ke ili ne volas insisti pri Esp. por ne malplaĉi al lia registaro, sed ke ili ankaŭ ne volus akcepti ion, kio ŝajnus iel ajn kontraŭ Esperanto „ĉar tiu movado havas multajn amikojn ĉe ni". Tiam s-ro Bardoux retiris sian proponon, kaj tiel la opinio de la Intelekta Komisiono restis nekonfirmita de la Ligo mem. Restis nur la konstato de la vivaj spertoj en la raporto akceptita en 1922, sed tio ne povis sufiĉi al ni malgraŭ ĝia pozitiva helpo.

Tiam ni decidis reveni al la propono pri oficiala permeso de Esperanto kiel „klara" lingvo en telegrafaj rilatoj, la unua dezirespremo de la Bulonja Kongreso. Ankaŭ ni decidis atendi ĝis registarŝanĝo en Francujo. Tio okazis en 1924, kaj la nova ĉefministro Herriot promesis nuligi la malpermesan cirkuleron de Léon Bérard. Post persona interkonsento kun s-ro Herriot ni petis subtenon de la ĉina, japana, nederlanda kaj aŭstralia delegitoj, kaj sukcesis voĉdonigi en la dua komisiono (per 13 voĉoj kontraŭ 9) la jenan rezolucion, poste konfirmitan de la Plena Kunsido de la Ligo la 20-an de septembro 1924 unuanime:

„La Ĝenerala Kunveno de la Ligo de Nacioj rekomendas, ke la ŝtatoj, membroj de la Ligo, konsentu al Esperanto la traktadon kaj tarifojn de lingvo ‚klara' en telegrafaj kaj radio-telegrafaj interrilatoj, kiel praktika helpa lingvo de la internaciaj interkomunikoj flanke de la naciaj lingvoj uzataj, kaj atentigas je tiu celo la organizon pri komunikado kaj transito."

Post tiom da malfacilaĵoj kaj ĉagrenoj ni kompreneble ĝojis pri tiu unua interŝtata agnosko de Esperanto kiel uzata lingvo kun preciza difino pri ĝia rolo.

La afero estis faciligata de la fakto ke mi tiam fariĝis vicdelegito de Persujo ĉe la Ligo post senpaga dujara helpado al la persa ĉefdelegito princo Arfa kiel „honora jurkonsilanto". Dum la jaroj 1920 kaj 1921 mi estis tradukisto de la paroladoj, kaj eksiĝis poste por libere agadi. Tiam mi rajtis mem sidi en komisionoj kaj defendi nian vidpunkton. En tiu tempo pluraj delegitoj reprezentis alian landon ol la sian. Ekzemple Lord Cecil reprezentis Sudafrikon laŭ elekto de la ĉefministro Smuts. Same Prof. Gilbert Murray. Ankaŭ mi povis sidi laŭrajte en la konferenco de la Universala Telegrafa Unuiĝo, kiu sidis en Parizo je septembro 1925 kaj obeis la rekomendon de la Ligo de Nacioj, ŝanĝante sian statuton en paragrafo 3 ĉe artikolo VII laŭ jena teksto: „La uzado de la latina lingvo *kaj de Esperanto* estas ankaŭ permesata."

Fine unu el la du dezirespremoj de la Bulonja Kongreso estis plenumata. La dua, pri la lernejoj, estas nia nuna tasko kaj ĝin helpas la rezolucio de UNESKO, kiun atingis gratulinde Prof. Ivo Lapenna post similaj penoj kaj ĉagrenoj. En tiu diplomata mondo nenio estas facila, kaj persista pacienco necesas. Tion ni lernis per sperto surloka.

Edmond Privat

Prezidintoj de UEA . . . 4



D-ro Edmond Privat (1889)

Prezidanto 1924-1928

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO

La monda organizaĵo de la Esperantismo 1936-1947

Iu diris ŝerce, ke Esperanto disvastiĝis en la mondo malgraŭ la esperantistoj. Per tio li aludis al la emo de la unuopaj esperantistoj en sia agado por la lingvo procedi laŭ sia propra kapo senkonsidere al la opinio kaj decido de la plimulto. La esperantistoj ja ĝenerale estas individualistoj. Sekve la Esperanto-movado bezonis multajn jardekojn antaŭ ol ĝi atingis solidan internacian organizformon.

Estas memkompreneble, ke komence la Esperanto-movado bazis sin sur la agado de la unuopaj adeptoj. Iom post iom fondiĝis Esperanto-grupoj. Proksimume en la jaro 1930 estis formitaj tutlandaj asocioj tiel fortaj en pluraj ŝtatoj, ke tiuj asocioj sentis la bezonon de internacia gvida centro, kiu havu je sia dispono necesajn ekonomiajn rimedojn. La gvidantoj de la landaj asocioj opiniis, ke UEA, kiu jam kreis mondampleksan reton de delegitoj por la praktika utiligo de la lingvo, fariĝu tia centro.

Post multjaraj traktadoj oni atingis provizoran solvon en la jaro 1933. Kiam la nova komitato de UEA kunsidis la postan jaron, ĝi elektis novan estraron sub la prezido de generalo Bastien. Tiu nova estraro, kiu komencis sian agadon kun fervoro kaj energio, baldaŭ trovis ke la aktiveco de la asocio estas grave malhelpata pro la manko de mono. Serĉante rimedojn por ŝpari monon la estraro i.a. proponis al la komitato, ke la centra oficejo translokiĝu de Svisujo al Britujo, kie la vivkostoj estas pli malaltaj, kaj kie troviĝas forta enlanda Esperanto-movado.

La komitato kaj 80 % de la delegitoj de UEA aprobis tiun translokiĝon, sed kelkaj svisaj esperantistoj, dezirante konservi la centron en Geneve, komencis leĝan proceson. Ĉar la komitato opiniis, ke tia proceso dum longa tempo povus malebligi la propagandan aktivecon de la centro, la komitato je kunsido en la jaro 1936 unuanime decidis forlasi UEA-n kaj fondi novan asocion IEL (Internacia Esperanto-Ligo) kun sidejo en Britujo.

Al IEL aliĝis jam en 1936 ĉiuj landaj asocioj, kiuj antaŭe apartenis al UEA, escepte de 2 (el kiuj la hispana ne povis pro la milito). IEL tuj komencis krei propran ampleksan delegitan reton ĉirkaŭ la tuta mondo. La ligo ankaŭ kun energio ekagis por fariĝi la gvida propaganda centro. Tamen de tempo al tempo la streĉa politika atmosfero pli kaj pli malebligis la planojn pri unueca internacia agado. Kaj en 1939 eksplodis la dua mondmilito.

Pro la invado de la naziistoj en multajn landojn de Eŭropo la Esperanto-movado estis malpermesata en tiuj landoj. Sed la organizan bazon de la monda esperantismo vivtenis la centra oficejo. IEL dum la tuta milito konstante eldonis sian monatan revuon kaj ĉiujare sian jarlibron (en 2 volumoj ĉiujare).

Ĉar la organo de IEL estis eldonata en Britujo, ĝi kompreneble ne povis esti sendata al la landoj, kiujn invadis la naziistoj. Tial mi, kiel vicprez. de IEL, presigis en Stockholm, situanta en neŭtrala lando, malgrandan Esperanto-bultenon, kiun mi de tempo al tempo distribuis al proks. 1.000 esperantistoj en la subpremitaj landoj. Jam en la unua bulteno (kiu cetere atingis preskaŭ ĉiujn adresitojn — la postajn bultenojn konfiskis pli kaj pli la naziistoj), mi admonis la gesamideanojn en la invaditaj landoj, ke ili eltenu, ke ili konservu la fidon je la estonto, ke ili ĉiam memoru ke kiel ajn estos la cirkonstancoj amikoj en la tuta mondo pensos pri ili kaj atendos la momenton, kiam ni denove povos reciproke amike premi la manojn. Multajn kortuŝajn respondojn mi ricevis. Mi aparte memoras iun anoniman ĉeĥon, kiu skribis: Koran dankon pro via mesaĝo, kiun legis ĉiuj samideanoj tie ĉi. Ni restos fidelaj — sed bonvolu ne sendi novan bultenon!

Cetere mi, kiel funkcia prez. de IEL, sukcesis de tempo al tempo dum la tuta milito havi kontakton kun multaj gvidaj esperantistoj ankaŭ en la invaditaj landoj — malgraŭ la cenzuro de la naziistoj.

Al pluraj militkaptitoj ni povis doni iom da materia helpo, kvankam kompreneble nur en mizere

Prezidintoj de UEA . . . 5



Karl Max Liniger
Prezidanto de UEA 1936-1941

malgranda amplekso. Sed tuj post la milito la sveda teritorio de IEL entreprenis grandskalan helpagadon al pluraj landoj, tiel montrante la internacian Esperantan solidarecon kaj helpopretecon.

La aktiveco de IEL dum la milito, kiu aktiveco estis realigita sub tre malfacilaj cirkonstancoj ebligis al nia movado ekflori tuj post la fino de la milito en ĉiuj landoj, kie la leĝoj tion permesis.

Post la milito komenciĝis novaj traktadoj inter IEL kaj la svisaj esperantistoj kun la celo plene unuecigi la internacian Esperanto-movadon. Kaj feliĉe tiuj traktadoj, pro ambaŭflanka cedemo, donis kiel rezulton la kunfandiĝon dum la unua postmilita universala Esperanto-kongreso, kiam IEL — kvankam la senkompare pli granda kaj forta asocio — cedis sian nomon por formi la novan U.E.A.

E. Malmgren

KONSTRUADO DE FORTIKA U.E.A.

1948 – 1958

Eĉ tuta libro apenaŭ sufiĉus por prezenti la multflankajn laborojn de U.E.A. en la lastaj jaroj kaj por analizi la kaŭzojn de ĝiaj konsiderindaj progresoj. En mallonga artikolo eblas, evidente, nur koncizege tuŝi sole la ĉefajn eventojn kun la celo doni almenaŭ palan bildeton pri tiuj grandegaj klopodoj, kiuj fine rezultigis neniam antaŭe atingitajn forton kaj pozicion.

Ordigi sian hejmon

Antaŭ la kunfandiĝo, en Internacia Esperanto-Ligo estis organizita la granda plimulto de la Esperantaj neŭtralaj asocioj kaj de unuopuloj. La malnova U.E.A., kun la sidejo en Ĝenevo, havis iom da individuaj membroj en diversaj landoj kaj inter ili troviĝis pluraj malnovaj pioniroj. Ekster ambaŭ organizaĵoj staris multaj, tre multaj unuopuloj kaj kelkaj landaj asocioj.

La kunfandiĝo de la jaro 1947 certe estis pozitiva faro, tre necesa. Ĝi signifis formalan reunuigon de la neŭtrala Movado. Sed tio per si mem ne solvis, nek povis solvi la multnombrajn, amasiĝintajn problemojn. La nova Estraro, elektita en Bern, sub la prezido de E. Malmgren, respegulis laŭ sia konsisto la ĵus kontraktitan kunfandiĝon. La Statuto de I.E.L. estis ŝanĝita konforme al la kontrakto. La plimulto decidis, ke restos la tradicia nomo: Universala Esperanto-Asocio.

Pri la rolo de U.E.A. ekzistis tri konceptoj. Unuj opiniis, ke U.E.A. estas celo al si mem, ke ĝin ne koncernas la disvastigo de la lingvo kaj la progresado de la Movado, sekve ke ĝi estas memsufiĉa. La alia starpunkto estis, ke U.E.A. esence povas tute bone ekzisti sen Komitato kaj sen Estraro, se ĝi nur havas sian oficejon, kiu eldonas la gazeton kaj la Jarlibron. Laŭ la tria koncepto, la tasko de U.E.A. devas esti ne nur doni al la membraro la du publikaĵojn, sed ankaŭ vastigi ĉiujn eblajn praktikajn servojn. Krome, U.E.A. kiel reprezentanto de la Esperantismo en la mondo, devas unuigi ĉiujn esperantistojn kaj asociojn, harmoniigi la tutan laboron en mondaj kadroj, altigi la kulturan nivelon de ĉiuj aranĝoj, havigi al la lingvo kaj al la Asocio la necesan prestiĝon, mallonge: sisteme organizi kaj laŭplane gvidi la Esperanto-Movadon.

La tria koncepto — kvankam tio povas ŝajni tre stranga — realiĝis nur iom post iom, venkante multegajn malfacilaĵojn kaj internajn kaj eksterajn. El la hodiaŭa vidpunkto multaj aktivecoj kaj atingoj de U.E.A. prezentiĝas kiel tute naturaj, sed en la komencaj jaroj de tiu ĉi periodo ili aspektis por multaj, ankaŭ por tre sindonaj esperantistoj, kiel nerealigeblaj fantaziaĵoj. Pri ĉiu nova plano aŭ projekto oni ofte aŭdis rimarkojn, ke ĝi, ja, estas bona, sed ke la Asocio havas nek rimedojn, nek homojn por realigi ĝin La respondo al tio ĉiam estis, ke bona kaj celtrafa, sistema laboro devas altiri iom post iom ĉiujn pozitivajn elementojn, aktivigi la organizaĵojn kaj la unuopulojn; ke tio siavice kreskigos la membraron, havigos al U.E.A. financan helpon por la realigo de konkretaj taskoj; ke la sukcesa plenumo de tiuj taskoj nepre devos plue fortikigi la Asocion kaj nombre kaj materie. La menciita tria koncepto opiniis, ke nur per granda fortostreĉo estas eble rompi la ensorĉitan cirklon de izoliteco, stagno, parte eĉ regreso. Ĝi fidis, ke en la Esperanto-Movado ekzistas multaj latentaj fortoj, kiuj certe manifestiĝos kiam U.E.A. komencos efektive gvidi la Esperantismon al la fina celo. Tiu starpunkto montriĝis korekta.

Paŝon post paŝo

La taskoj, kiujn frontis U.E.A. post la kunfandiĝo estis multnombraj: interne organiza fortikiĝo, plibonigo de la kongresoj, problemoj de informado, kursoj kaj praktikaj aplikoj; ekstere rompo de la ĉenoj de apartiĝo ĝis la grado de sekteco kaj starigo de kontaktoj kun la mondo, kun diversaj ŝtataj kaj neŝtataj organizaĵoj. Jen, treege mallonge, historieto de tiu agado:

En la jaro 1949, tuj post la kongreso en Bournemouth, estis ellaboritaj la regularoj pri la Internacia Somera Universitato, Belartaj Konkursoj kaj Oratoraj Konkursoj. Estis organizita aparta Propaganda Fako, kiu poste ricevis la nomon Informa Fako de U.E.A. Fine de 1949 kaj komence de 1950 la subskribinto faris grandan prelegvojaĝon

tra pluraj landoj de Eŭropo. Ekfunkciis la Internacia Gazetara Servo. En tiu jaro la Asocio havis 18.749 membrojn.

En 1950 estis la unuan fojon organizita la Kongresa Gazetaro Servo dum la U.K. en Parizo. La efiko estis tre kontentiga. De tiam la K.G.S. estis organizata ĉiujare kaj daŭre perfektiĝis, atinginte dum la kongreso en Marseille (1957) sian kulminan punkton. Okaze de la U.K. en Bournemouth ĵurnalisto, hazarde aŭdinta pri la kongreso, informiĝis pri ĝiaj aranĝoj ĉe la servisto (neesperantisto) de la Londona Esperanto-Klubo. Okaze de la U.K. en Marseille aperis en la tutmonda gazetaro miloj da informoj liveritaj de la K.G.S. En la jaro '50 la laboroj de la U.K. estis por la unua fojo dividitaj en sekcioj. En tiu jaro larĝiĝis la Informa Fako de U.E.A. kaj organiziĝis pluraj landaj I.F. En 1950 la membraro de U.E.A. falis al 14.711, grandparte pro realaj malhelpoj, sed parte ankaŭ tial, ĉar en la antaŭa jaro multaj kotizoj al landoj, kiuj ne povis sendi monon, estis pagitaj el la Propaganda Konto.

En aŭtuno de la jaro 1951 realiĝis la plano por la fondo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado. Estis senditaj la unuaj cirkuleroj, kolektitaj malgrandaj sumoj por la funkciigo de tiu nova institucio, havigitaj la unuaj kunlaborantoj. En tiu jaro U.E.A. havis 14.943 membrojn.

La 1-an de januaro 1952 ekfunkciis C.E.D. Ĝi tuj komencis grandan laboron sur la kampo de esploroj, verkado de studoj, kolektado de dokumentaj materialoj, eldonado de regulaj kaj specialaj dokumentoj en diversaj lingvoj. C.E.D. ankaŭ liveris jam pretajn artikolojn al la landaj I.F. pere de la I.F. de U.E.A. La jaron 1952 markas ankaŭ tiuj ĉi eventoj: granda gazetara kampanjo okaze de la UNESKO-Konferenco en Parizo, unua kunveno de la reprezentantoj de la landaj Informaj Fakoj en Oslo, kompletigo de la Statistiko pri la Esperanto-Movado, Internacia Debatvespero en Parizo por la partoprenintoj de la UNESKO-Konferenco. Tiu tuta laboro plifirmigis la poziciojn de Esperanto en la mondo. La UNESKO-Konferenco decidis komuniki la Internacian Peticion al la ŝtatoj-membroj. Tio siavice ebligis novan mondskalan kampanjon. En 1952 la membraro montris plian kreskon: 16.243.

En 1953 la Movado jam posedis bonege organizitan Informan Fakon de U.E.A. kun multaj landaj I.F. kaj kun kvindeko da rektaj kunlaborantoj. Plue ĝi disponis pri C.E.D. kiel fonto de dokumentitaj informoj kaj elstaraj artikoloj kaj studoj. La sama artikolo jam povis aperi en cento da gazetoj, kelkfoje eĉ en 30—35 diversaj lingvoj! Tiu tuta aparato estis metita en la servon de unu granda celo: la UNESKO-Konferenco, okazonta fine de 1954 en Montevideo. Estis, plue, organizita speciala reto de kunlaborantoj en la UNESKO-afero. Ilia tasko estis kontakti siajn landajn kompetentajn instancojn. C.E.D. sendis al la Sekretariato de UNESKO 50-paĝan tajpitan raporton pri la tiama stato de la Internacia Lingvo en la mondo. Al la raporto estis aldonitaj proksimume 200 paĝoj da apogaj dokumentoj. Multaj landaj asocioj ellaboris specialajn raportojn por siaj naciaj UNESKO-Komisionoj aŭ aliaj aŭtoritatoj. Estis farita ankaŭ aparta petskribo por akiro de la konsultaj rilatoj kun UNESKO. En 1953 la membraro kreskis al 16.861.


Venis la historia jaro 1954. Intensiĝis la gazetara kampanjo. C.E.D. eldonis specialan dokumenton (CED/4) en la lingvoj angla, franca kaj hispana por la membroj de la UNESKO-Konferenco en Montevideo. En kunlaboro kun la Urugvaja Esperanto-Societo estis kolektita abunda materialo por granda ekspozicio. La Unua Universala Ekspozicio de Esperanto estis aranĝita en Montevideo okaze de la UNESKO-Konferenco. Post dramecaj okazintaĵoj la Konferenco de UNESKO akceptis la 10-an de decembro 1954 la faman Rezolucion favore al Esperanto. Du tagojn antaŭ tio U.E.A. unuanime ricevis la pozicion de konsulta asocio en la rilatoj kun UNESKO. Dekmilo da artikoloj kaj informoj aperis en la gazetaro de ĉiuj landoj. La konsultaj rilatoj, voĉdonitaj la 8-an de decembro, havigis al U.E.A. aŭtomate oficialajn rilatojn kun U.N. En la kadro de tiu nova pozicio U.E.A. povis evoluigi multflankan kunlaboradon kun UNESKO, dum al la landaj asocioj malfermiĝis la pordoj por kunlaborado kun la Naciaj UNESKO-Komisionoj. En 1954 la membraro kreskis al 17.001.

En 1955 estis akceptita la nova Statuto, kun la samaj celoj kaj fundamentaj organizformoj, sed kun konsiderindaj plibonigoj rilate la konsiston de la Estraro, fikson de la rolo de diversaj organoj, larĝigon de la eblecoj por aliĝo ankaŭ de malpli grandaj organizaĵoj. La Baza Laborprogramo fariĝis fundamento de ankoraŭ pli sistema laboro. Post plurjaraj klopodoj estis vendita la domo en Heronsgate kaj la sidejo de la Asocio transportita al la centro de Rotterdam, mondgrava haveno kaj komerca urbo. La 28-an de decembro estis inaŭgurita la nova oficejo en la ĉeesto de la roterdama urbestro, multaj reprezentantoj de kulturaj neesperantistaj institucioj kaj de diversaj Esperanto-organizaĵoj. En tiu jaro la Asocio atingis 21.762 membrojn kaj tiamaniere la unuan fojon en sia historio transpasis la ciferon 20.000.

La 1-an de januaro 1956 la revuo „Esperanto" komencis aperadi en la nova formato. La bulteno „UNESKO-Novaĵoj" estis tiel bone akceptita de la Esperanto-gazetaro kaj en la medioj de UNESKO, ke U.E.A. decidis ĝin plue regule eldonadi. En tiu jaro la Informa Fako de U.E.A. komencis publikigi plian eldonaĵon: specialan informan bultenon en la angla kaj franca por la landoj sen organizita Esperanto-Movado. Aperis la 6-lingva

LABORO KAJ PROGRESO

U. E. A. - 1949 - 1958



INTERNACIA SOMERA UNIVERSITATO

ORATORAJ - BELARTAJ KONKURSOJ - REGULARO I.S.U. - INTERNACIA GAZETARA SERVO

PROPAGANDA - INFORMA FAKO - LANDAJ I.F. - RETO DE KUNLABORANTOJ

KONGRESA GAZETARA SERVO

SEKCIOJ - PUBLIKAJ KUNVENOJ DE UNIVERSALAJ KONGRESOJ -

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

PRELEG-VOJAĜO LAPENNA

STATISTIKO PRI LA ESPERANTO-MOVADO

KUNVENO DE INFORMAJ FAKOJ OSLO

INTERNACIA DEBAT-VESPERO EN PARIZO

DOK CED/3 TRILINGVA

DECIDO DE UNESKO PARIZO

GRANDEGA GAZETARA KAMPANJO

DOK. C.E.D./4 3-LINGVA

AMPLEKSA RAPORTO DE CED AL UNESKO

RAPORTOJ DE LA LANDAJ ASOCIOJ AL NACIAJ UNESKO INSTANCOJ

UNUA UNIVERSALA EKSPOZICIO DE ESPERANTO MONTEVIDEO

REZOLUCIO DE U.N.E.S.K.O. DE LA 10-a DE DECEMBRO 1954

GAZETARA KAMPANJO POST LA REZOLUCIO DE UNESKO

KONSULTAJ RILATOJ KUN UNESKO KAJ UN

EŬROPA KAMPANJO

NOVA STATUTO

BAZA LABORPROGRAMO
EKSPEDICIO SEKELJ EN AZIO

ARANGĜO

TRANSLOKIGO AL R'DAM

FROSTA-VALLEN

NOVA FORMATO „ESPERANTO"

FLUGFOLIOJ 6-LINGVAJ

2-a ELDONO

ESPERANTO EN INDEX TRANS-LATIONUM DE UNESKO

KONFERENCO ARNHEM PRI LA LINGVA PROBLEMO EN EŬROPO

UNIVERSALA EKSPOZICIO EN STRASBURGO KAJ KOPENHAGO

EKSPEDICIO SEKELJ EN AZIO

SPECIALA BULTENO UNESKO NOVAĴOJ

AFIŜOJ DE UNESKO KAJ U.N

I.G.S. { FRANCA / ANGLA

DOK CED/5 7-LINGVA

ELDONA FAKO

A A

MAGNETOFONA SERVO

KORESPONDA SERVO MONDSKALA

ELLABORITA DE C.E.D.
DESEGNITA DE J. CALADO

flugfolio en 40.000 ekzempleroj. Lic. Tibor Sekelj, kun du gehelpantoj, komencis sian grandan vojaĝon en la landoj de Azio kun la celo diskonigi la lingvon kaj instrui ĝin. Pluraj internaciaj organizaĵoj eldonis prospektojn en Esperanto. La Universala Ekspozicio estis prezentita en Strasburgo kaj Kopenhago. La Internacia Lingvo estis trafe reprezentita en la granda konferenco en Arnhem, kiu pritraktis la lingvan problemon en Eŭropo. Dank' al la interveno de C.E.D., kiu liveris la tutan materialon, en la verko Index Translationum estis menciitaj verkoj, tradukitaj el diversaj lingvoj al Esperanto. En kunlaboro kun la sveda Eldona Societo, U.E.A. publikigis diskon kun paroladetoj de reprezentantoj en la U.K. en Bologna. Fine de la jaro okazis la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en New Delhi kaj U.E.A. estis ankoraŭfoje reprezentita. Grava kultura evento estis la diskutsemajno en Frostavallen, kiu, interalie, pritraktis en specialaj kunvenoj la problemojn de la Movado, ĉefe rilate informadon, instruadon kaj praktikan utiligon. Alia kultura evento estis la fondo de la Eldona Fako de U.E.A. Komenciĝis la kampanjo por la apogantoj. Menciindaj estas ankaŭ la diversaj aranĝoj okaze de la 10-jara jubileo de UNESKO. Estas elektita nova estraro kaj Prof. D-ro G. Canuto fariĝis prezidanto. En 1956 U.E.A. havis 25.181 membrojn kaj tiamaniere ĝi batis sian propran rekordon de la antaŭa jaro.

En 1957 UNESKO publikigis je siaj kostoj afiŝojn kun teksto en Esperanto. Aperis ankaŭ afiŝo de U.N. kun mallonga teksto en la Internacia Lingvo. En la oka volumo de Index Translationum estis publikigitaj novaj bibliografiaj informoj pri tradukoj el la naciaj lingvoj en la Internacia. Estas fonditaj Magnetofona Servo kaj la Koresponda Servo. En Grésillon okazis, sub la aŭspicioj de U.E.A. kaj kun la aktiva helpo de C.E.D., plia elstara kultura aranĝo kun prelegoj filmprezentadoj, diskutvesperoj. La ĉeestintaj kunlaborantoj de C.E.D. havis tiuokaze specialan kunvenon. T.E.J.O. fariĝis sekcio de U.E.A. Aperis la dua disko de U.E.A. kaj de la Eldona Societo. Dua eldono de la seslingva flugfolio. Fine de la jaro estis publikigita la impona verko Angla Antologio. Komenciĝis la preparlaboroj por grandiozaj festoj en 1959 okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof. Fine de 1957 U.E.A. havis 27.138 membrojn. Ankoraŭfoje ĝi superis sin mem.

Prezidintoj de UEA . . . 6



Hans Kürsteiner (1888)
Prezidanto de UEA 1941-1948

Perspektivoj

Eĉ la plej supraĵa analizo de la skize prezentitaj faktoj montras kun absoluta certeco, ke la nombra kresko kaj ĝenerala fortikiĝo de la Asocio estas rekta rezulto de la efektivaj laboroj, kiujn ĝi plenumas. Aliflanke, la organoj de la Asocio povas des pli sukcese aktivi, ju pli granda estas la apogo de la tuta esperantistaro al U.E.A. En la sama periodo ĝenerale kreskis kaj fortikiĝis ankaŭ la Esperanto-organizaĵoj en multaj landoj. Paralele estas faritaj konsiderindaj progresoj sur ĉiuj aliaj kampoj: literatura, gazetara, kultura en diversaj aspektoj. Nova spirito ekanimis la tutan Movadon. Estas ankaŭ kelkaj esceptoj. En la sama periodo, en kiu U.E.A. faris tiel rimarkindan progreson, en 1—2 landoj niaj organizaĵoj regresis. En tiaj kazoj oni tendencas kulpigi la „eksterajn cirkonstancojn". Tiu starpunkto estas erara. Ne ekzistas tiel malfavoraj eksteraj cirkonstancoj, kiuj malebligus efike labori. Unuopuloj — kaj ankaŭ organizaĵoj — plenaj de fido kaj konvinko sukcese agis por Esperanto eĉ en koncentrejoj, en karceroj kaj sur batalkampoj! La kaŭzojn de malsukcesoj oni serĉu ĉiam unuavice en si mem kaj eble ankaŭ en la malnoviĝintaj organizformoj.

La esperantismo estas ankoraŭ Movado batalanta. Kiel tia ĝi daŭre bezonas novajn inspirojn, firman konvinkon, multe da oferemo. Kaj antaŭ ĉio estas necese fidi, ke per propraj fortoj, unuece kaj firme kunligitaj, disciplinite plenumante la decidojn de ĉiuj organoj en la kadro de la Statuto kaj Regularoj, ni tute certe povas daŭre akiradi por la Internacia Lingvo novajn poziciojn ĝis la momento, kiam ĝi estos tiel disvastiĝinta, ke ĉiu ajn plua laboro fariĝos superflua. Sed ĝis tiu momento la esperantistaro bezonas fortegan U.E.A., kaj U.E.A. bezonas la apogon de la tuta esperantistaro. Oni ĉiam bone memoru, ke U.E.A. estas nek la Estraro, nek la Komitato, nek la diversaj oficejoj, sed ni ĉiuj: la landaj kaj fakaj asocioj, la delegita reto, la membraro, ĉiuj organoj. Kiam oni plene komprenos tiujn verojn, U.E.A. povos konduki la Internacian Lingvon antaŭen ankoraŭ multe pli rapide kaj pli impete.

Ivo Lapenna

„MONTEVIDEO" KAJ ĜIAJ SEKVOJ

En la Esperanto-Movado la vorto „Montevideo" ne nur estas la nomo de la ĉefurbo de Urugvajo, sed ĝi estas la simbolo de unu el la plej gravaj mejloŝtonoj en la historio de la Internacia Lingvo: ĝia unua oficiala rekono.

„Montevideo" havas du aspektojn: Akcepto de Rezolucio kaj Akiro de Konsultaj Rilatoj.

La Rezolucio havas longan antaŭhistorion, ne rakonteblan en kelkaj alineoj. Ĝi estas en detaloj troveblaj en la postmilitaj jarkolektoj de la revuo „Esperanto".

Ĝi komenciĝis ĉe la iniciato de U.E.A. kolekti subskribojn por Petskribo favora al Esperanto, direktota al Unuiĝintaj Nacioj. Tiu Petskribo, kun subskriboj en la nomo de pli ol 16.000.000 da personoj tra la tuta mondo, inter kiuj troviĝas gravegaj personecoj kiel prezidanto de respubliko, ĉefministroj kaj ministroj, sennombraj sciencistoj ktp. estis transdonita al la sekretario de la Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj la 2-an de aŭgusto 1950 en Lake Success. La 10-an de la sama monato la Sekretario de U.N. transdonis ĝin al la Sekretario de U.N.E.S.C.O. kiel kompetenta instanco por afero kiu rilatas al eduko, kulturo kaj scienco.

La Sekretario de UNESKO opiniis, ke ĝi ne povas memstare ion fari en tiu ĉi afero kaj ĝi starigis la demandon antaŭ la Plenumkomitato de UNESKO. Tiu ĉi instanco siavice transdonis la demandon al la supera organo de UNESKO, la Ĝenerala Konferenco. Ĝi tamen ne faris el ĝi apartan punkton, sed envolvis ĝin en larĝan ĝeneralan lingvan problemon, en kiu la Petskribo estis menciita per kelkaj linioj (Dok. JC/PRG/11 de 22-8-'52) kaj por kies studo neniu sumo estis antaŭvidita en la budĝeto de UNESKO. En tia formo — se entute oni povas paroli pri formo — la Petskribo troviĝis antaŭ la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Parizo en nov./dec. 1952. Montojn movis la instancoj de U.E.A., precipe C.E.D., ĝia direktoro Prof. Lapenna kaj liaj kunlaborantoj en multaj landoj, por ion atingi en Parizo malgraŭ tiu malbona situacio. Detalojn pri tiu ampleksega laboro, kiu kondukis al favora rezolucio, oni legu en la januara numero 1953 de la revuo Esperanto. Tiu rezolucio, per brita amendo en la lastaj momentoj de la Konferenco, bedaŭrinde metis la tutan demandon sur nacian nivelon anstataŭ lasi ĝin, kiel devus esti laŭ ĝia karaktero kaj kiel estis laŭ la originala teksto, sur internacia nivelo. Tamen, ĝi malfermis la pordojn de multaj naciaj UNESKO-Komisionoj antaŭ la naciaj kunlaborantoj esperantistaj, kiuj devis, dum du jaroj, prepari la venontan paŝon ĉe UNESKO, en la Ĝenerala Konferenco en Montevideo.

Estis klare ke en tiu Konferenco U.E.A. devos havi sian reprezentanton kiel oficialan observanton. Estis starigita „Fondaĵo Montevideo". Kun granda kompreno pri la graveco de la celo, la tutmonda esperantistaro malavare donacis por tiu fondaĵo, tiel ke estis eble sendi reprezentanton kaj pagi ĉiujn aliajn kostojn: ekspozicio, dokumentoj, presaĵoj, k.t.p.

Estis klare ankaŭ, ke la defendonto povis esti nur Prof. Lapenna, homo kiu konas UNESKON kiel sian poŝon, kiu konas la jurajn eblecojn kaj neeblecojn, kiu kuraĝas batali eĉ en ŝajne malesperigaj cirkonstancoj. Kiel necesega estis ankaŭ tiu lasta eco, tion ĉiu povas konstati laŭ la detala raportaro en la februara kaj marta numeroj 1955 de la revuo Esperanto. Tamen, tiu raportaro donas nur tre palan bildon de tio kio vere okazis.

En tiuj tagoj mi ĝuis la privilegion restadi en C.E.D. en Londono por funkciigi la ĉiutagajn laborojn laŭ la eblecoj.

Pri la okazantaĵoj D-ro Lapenna skribis aron da leteroj al la Prezidanto de U.E.A., preskaŭ kiel taglibron. La kopiojn de tiuj leteroj li sendis al mi kaj poste petis min kompili el ili raporton por interna uzo. El ili leviĝas bildo de leona batalo kontraŭ antaŭjuĝoj, nescio kaj rekta malbonvolo, kiu kulminis post hontinda kotĵetado en plena rehonorigo kaj akcepto de favora rezolucio, kiu plene rekonas la rezultojn atingitajn de la Internacia Lingvo.

Pri la okazintaĵoj ni menciu ĉi tie nur, ke sub premo de la publika opinio kaj sub impreso de la spertita potenco de la Esperanto-Movado, UNESKO estis devigita publike rekoni eraron faritan kaj nuligi antaŭan decidon per revoĉdonigo en la Pleno. Fakto, neniam antaŭe okazinta en ĝia historio. Nur giganta forto, lerteco, energio kaj persisto povis tion atingi.

Intertempe, la Administra Komisiono de UNESKO estis akceptinta ĉiuvoĉe U.E.A. kiel ne-registaran organizaĵon en Konsultaj Rilatoj kun UNESKO. Tiu decido estis konfirmita de la Pleno la 8-an de decembro 1954.

Grandegan kontribuon al ambaŭ decidoj donis la modele aranĝita Universala Esperanto-Ekspozicio, kompilita de C.E.D. kun la helpo de la tutmonda esperantistaro kaj bonege prizorgata de la montevideaj geamikoj.

La flankaj efikoj kaj sekvoj de „Montevideo" estas multaj kaj diferencaj.

Ĝi donis okazon havigi amason da objektiva informa materialo pri Esperanto al oficialaj instancoj. La speciale eldonitaj dokumentoj CED/3 kaj CED/4 estis disvastigitaj en tri naciaj lingvoj en granda nombro.

Ne plu estos eble ke UNESKO traktu iun ajn temon rilatantan al la ĝenerala problemo de lingvoj

en la internaciaj rilatoj, ne petinte nian kunlaboron.

La interna kaj ekstera forto de la Movado ĝenerale kaj de la Asocio speciale ricevis gravan plifirmigon.

La prestiĝo de la Internacia Lingvo en ĉiaj oficialaj medioj konsiderinde altiĝis. La esenca signifo ja estas, ke UNESKO rekonas la rezultojn jam atingitajn de Esperanto kaj ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de UNESKO mem. Sekve, tiu kiu agnoskas la celojn kaj idealojn de UNESKO, ne rajtas ignori la Esperanto-Movadon.

La Konsultaj Rilatoj jam plurfoje donis al UEA okazon por efika agado kaj regula kunlaborado kun UNESKO. Akurate ĝi plenumas sian devon detale raporti al UNESKO pri siaj laboroj kaj sendi al ĝi siajn publikaĵojn. UEA jam fariĝis unu el la plej aktivaj neregistaraj Asocioj en Konsultaj Rilatoj kun UNESKO. Lastatempe, unu el niaj reprezentantoj estas prezidanto de subgrupo de Laborgrupo de N.R.O. de UNESKO.

Sekve de la Konsultaj Rilatoj, en pluraj Naciaj UNESKO-Komisionoj eniris reprezentantoj de la nacia Esperanto-Movado kaj havas okazon fari tie gravan informan laboron.

Grandskala publika informado pri la Internacia Lingvo en la tutmonda gazetaro rezultis el la tuta afero-Montevideo, antaŭ, dum kaj post ĝi. Pli ol 2500 artikoloj aperis inter la fino de la Pariza kaj la fino de la Montevidea Konferencoj.

U.E.A. regule disvastigas UNESKO-Novaĵojn, dum UNESKO plurfoje publikigas informojn pri U.E.A., i.a. en Unesco-Courier kaj en Unesco-Features. Pri la mencioj de Esperanto en UNESKO-dokumentoj kaj publikaĵoj vidu p. 67 febr. no. 1955 kaj p. 60 aprila no. 1957.

Interkonsente kun la Sekretariato de UNESKO, en Index Translationum estas enlistigitaj la esperantaj tradukoj laŭ informoj ricevitaj de CED kaj kompilitaj de ĝia kunlaboranto S-ro W. Auld.

Okaze de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en New Delhi U.E.A. estis reprezentita de S-ro Tibor Sekelj. Okaze de la 10-jara ekzistado de UNESKO el ĉiuj anguloj de la mondo la Esperanto-Movado sendis gratulleterojn kaj telegramojn al tiu Konferenco en New Delhi. U.E.A. estis la sola organizaĵo en Konsultaj Rilatoj kun UNESKO, kiu tion faris.

UNESKO eldonis okaze de sia jubileo belegan serion de 18 fotoafiŝoj en diversaj lingvoj, inter kiuj ankaŭ Esperanto.

UNESKO donis aŭspiciojn al pluraj internaciaj konferencoj uzantaj Esperanton kiel oficialan lingvon (Frostavallen, Grésillon).

Larĝaj estas la perskpektivoj kiuj malfermiĝas antaŭ la Esperanto-Movado post la decidoj de Montevideo. Necesos nur utiligi ilin por konduki la Movadon al novaj sukcesoj. ***M. H. V.***

UEA KIEL ORGANIZANTO DE MONDINFORMADO

Disvastigi la ideon de komuna neŭtrala lingvo en la internaciaj rilatoj, diskonigi la valoron de Esperanto kiel sola solvo de la lingva problemo en la mondo, informi la vastan publikon pri la rezultoj atingitaj de la Internacia Lingvo en ĉiuj kampoj de publika utiligado kaj instigi ĝin lerni kaj uzi Esperanton, estis ek de la komenco la ĉefa celo de la esperantistoj. Al tiu celo, ligita kun la idealoj de tuthomaraj interkompreniĝo kaj solidareco, ili dediĉis — kaj en unuopa agado kaj pere de la komunaj organoj, lokaj, naciaj kaj internaciaj — sian plej grandan entuziasmon kaj al ĝi ili oferadis senmezure tempon, energion kaj financajn rimedojn.

Dum multaj jaroj, nome de la naskiĝo de Esperanto ĝis la unua periodo post la lasta milito — kun nur kelkaj esceptoj, ekz. koncerne la Societon Francan por la Propagando de Esperanto, kies epizodeco, cetere, konfirmas la ĝeneralan situacion — la propagando de la Internacia Lingvo estis persona aŭ loka iniciativo. El tio rezultis, ke la poresperanta varbado baziĝis sur ofte subjektiva informado, varia kaj eĉ kontraŭdira de esperantisto al esperantisto, kelkfoje senproporcia aŭ pro troa entuziasmo de la varbanto, aŭ pro lia esperantista nematureco, aŭ pro mallerta reago al malfavoraj cirkonstancoj en pioniraj tempoj. Mankis interŝanĝo de ideoj kaj spertoj pri propaganda laboro, mankis unuecigo kaj ekonomiigo de la klopodoj sur tutmonda tereno, mankis, plej grave, studado de la problemoj je la lumo de psikologia kaj scienca organizado de la laboro. Ne ekzistis konstanta kaj ĝisdata dokumentado kaj statistikado pri Esperanto. Ankoraŭ post la dua mondmilito, en protestaj leteroj kontraŭ negativa artikolo en granda gazeto kelkaj esperantistoj polemikis, ke la esperantistoj en la mondo estas „pluraj centmiloj", aliaj skribis, ke ili superas „kvin milionojn" kaj aliaj informis pri „pli ol 16 milionoj".

Post la fino de la dua mondmilito, la kunfandiĝo inter IEL kaj UEA, nome la akcepto de la principo, ke la nova Asocio sub la nomo de UEA estu unuece kaj federacie la organizaĵo de ĉiu organizita esperantisto en la mondo, signis la komencon de nova epoko. Iom post iom, UEA transiris de statika pozicio de simple administra organo, kiu observas kaj registras la faktojn pri Esperanto, al dinamika institucio, kiu kunordigas, gvidas kaj demokrate reprezentas la Esperanto-Movadon. La multaj sukcesoj, kiuj senhalte kronis la evoluon,

estas plej elstare simbolitaj, ekstere, de la venko en Montevideo, la unua planita mondkampanjo, en kiu vaste kunlaboris la Landaj Asocioj kaj la unuopaj esperantistoj en la tuta mondo, kaj, interne, de la nova Statuto, de la kreo de CED kaj de la translokiĝo de la Centra Oficejo al la granda kontinenta centro Rotterdam.

La novaj ideoj pri metodoj kaj kunlaboro alportis profundajn modifojn ankaŭ en la kampo de la mondpropagando de Esperanto. En Bournemouth — kongreso en kiu ankoraŭ ne agis moderne funkcianta Gazetara Servo — naskiĝis — necesas rimarki la kontraston! — la Informa Fako de UEA, kiun Prof. Lapenna de tiam direktas. En la unuaj tempoj estis necese elradikigi kelkajn fundamentajn erarojn flanke de la esperantistoj mem kaj poste stimuli la formiĝon de naciaj Informaj Fakoj. Al la unua celo plej energie dediĉis sin la iniciatinto de la Informa Fako de UEA per tre granda nombro da artikoloj, cirkuleroj, prelegoj kaj personaj kontaktoj: tiuj lastaj dum lia prelegvojaĝo tra ĉ. 150 urboj de Belgujo, Britujo, Francujo, Islando, Italujo kaj Nederlando. Al nebula propagando estis anstataŭita serioza informado pri la konstantaj atingoj de la Internacia Lingvo. Pluraj artikoloj de elstaraj esperantistoj, disdonitaj de UEA kaj tradukitaj en diversajn lingvojn, flanke kun la informoj de la kreiĝinta Internacia Gazetaro Servo, paŝon post paŝo regajnis al Esperanto ĝian reputacion. Antaŭ la publika opinio la Internacia Lingvo ĉesis esti hobio por maniuloj kaj atingis ĉiam pli altan konsideron; Esperanto fariĝis kultura Movado, kiu strebadas solvi, en la intereso de la tuta homaro, unu el la plej bazaj sociaj problemoj: tiun de la lingva interkompreniĝo.

Tiu larĝavida agado, gvidata laŭ la linio de kelkaj simplaj kaj klaraj principoj, trovis eĥon en la tuta Asocio. Ĝi malfermis novajn laborkampojn al nova generacio da esperantistoj, dank' al kiuj fondiĝis, laŭ la samaj principoj, Informaj Fakoj ĉe la Landaj Asocioj kaj, en ilia kadro, ĉe la lokaj societoj. Fine de la pasinta jaro 32 landoj formis kun siaj Informaj Fakoj tutmondan reton, kiu, krom internaj aktivecoj laŭ la lokaj cirkonstancoj, plenumis internacie planitajn kampanjojn. Senprecedenca kaj nesuperita restas inter ili la Montevidea. La rezultintaj artikoloj, elmontritaj sur 25 kvadrataj metroj en la Universala Ekspozicio, estis poste grava argumento utiligita de la reprezentanto de UEA. La komuna laboro, la amasiĝo de rezultoj kaj spertoj, la reciproka interŝanĝo de ideoj kaj la studado de labormetodoj en ĉiu organiza direkto (vertikala: de la lokaj societoj, tra la Landaj Asocioj, ĝis la internacia centro, kaj horizontala: loko kun loko, lando kun lando) pulse maturigis la ellaboron de teorioj kaj praktikaj komunaj konceptoj, kiuj — konkretiĝintaj en la kunvenoj de la Informaj Fakoj en Munkeno, Oslo kaj Haarlem — trovis sian definitivan ordigon en la tezaro akceptita en la kunveno de Frostavallen (1956).

Kun la Baza Laborprogramo de UEA, la informado konis novan svingon. Unu el la tujaj sekvoj estis la renovigo de la Internacia Gazetara Servo, kies komunikoj kaj artikoletoj estas tradukataj de 84 kunlaborantoj por la nacilingva gazetaro. La bultenoj de la Internacia Gazetara Servo aperas dufoje monate: 64 numeroj alportis ĝis nun al la landaj Informaj Fakoj 250 elektitajn novaĵojn pri Esperanto en objektiva ĵurnalisma stilo. La Baza Laborprogramo dediĉis apartan atenton al tiuj mondregionoj, kie Esperanto ankoraŭ ne estas sufiĉe disvastigita: ĉefe al Afriko kaj Azio. Por penetrigi la Internacian Lingvon, estas utiligataj kiel periloj la naciaj lingvoj. Speciala Bulteno en angla kaj en franca estas rekte sendata al ĉ. 200 gazetoj kaj informagentejoj: kiam la cirkonstancoj estos favoraj, tiuj bultenoj aperos ankaŭ en aliaj lingvoj, inter kiuj en araba kaj rusa. Tutlandaj aŭ internaciaj gazetaraj konferencoj, kiuj antaŭe estis nekonataj en nia Movado, fariĝis normalaj okazintaĵoj en la kadro de la Universalaj Kongresoj. Tre rimarkindaj, pro la nivelo, estas la gazetaraj konferencoj en Hotel Bologna (Bologna 1955), en Restoracio Nimb (Kopenhago 1956) kaj en Hotelo Lutetia (Parizo 1957). Tiuj konferencoj ne estas la solaj aranĝoj de la Kongresa Gazetara Servo. Kiel branĉo de la Informa Fako de UEA, ĝi nun funkcias tutan jaron antaŭ la Kongreso sur la kampoj de Radio, Televido, Kino kaj Gazetaro Se oni pensas, ke, grandparte dank' al ĝia laboro, sciigoj pri la Marseilla Kongreso aperis en pli ol 40 milionoj da gazetekzempleroj en la sola Francujo, oni povas ricevi impreson pri la aktualeco de niaj metodoj. Nova fako, inaŭgurita de la 42-a, estas la serio de ĝeneralaj kaj fakaj artikoloj pri Esperanto je dispono de la kongresanoj por aperigo en nacilingvaj gazetoj: 150 ekzempleroj da tiaj artikoloj estis disdonitaj al interesuloj en Marseille. Kaj ĉar hodiaŭ la bildo estas unu el la ĉefaj portantoj de informoj, la Foto-Servo kreita en Bologna, kiu povas liveri al ĵurnalistoj taŭgajn kaj pretajn bildojn pri la aplikoj de Esperanto, ludas gravan rolon.

La informada laboro de UEA ne utiligas nur la klasikajn amasrimedojn, sed eniras profunden ankaŭ en specialigitajn laborregionojn. Unu el ili estas la internaciaj kongresoj kaj konferencoj. En 1956 okazis en la mondo 1118 da ili. La Informa Fako de UEA, plenumante la Bazan Laborprogramon, klopodas atentigi la partoprenantojn, en la mezo de iliaj lingvo-malfacilaĵoj, ke ekzistas solvo — Esperanto. La seslingva faldfolio, eldonita de UEA en 100.000 ekzempleroj, estas la taŭga informilo. La Informa Fako de UEA periode sciigas la Landajn Asociojn pri la internaciaj kongresoj, kiuj okazas en ilia teritorio.

La agado en la landoj Esperante subevoluintaj estas apogata de la Ekspedicio Sekelj, la kuraĝa esploristo, kiu de la Proksima Oriento transiris al la Malproksima, en ĉiu loko lasante semojn pri Esperanto. Malpli ampleksaj, sed same aŭspiciitaj de UEA, estis kelkaj prelegvojaĝoj, ekz. de Gesroj Potts kaj de S-ro Starke.

Grandan impulson al la informado donas CED. Kvankam ĝi ne estas informada, sed scienca institucio, tamen ĝiaj esploroj en pluraj okazoj estas larĝe utiligataj por informadaj celoj. CED, krome, plenumas tre gravan funkcion: per strikte objektivaj analizaj dokumentoj ĝi klare registras la realan staton de Esperanto en la diversaj sektoroj kaj per tio ĝi konstante gardas la nivelon de nia informado for de danĝeraj memtrompigaj vojoj.

Diskoj kaj sonbendoj, eldonitaj de UEA aŭ de ĝi provizataj, pruvas al la skeptikuloj la unuecon de la Esperanto-elparolo. Pri la literaturo de la Internacia Lingvo kaj pri ĝiaj praktikaj servoj dokumentas la Universala Ekspozicio, iniciatita kaj zorgata de CED. La verko „La Internacia Lingvo — Faktoj pri Esperanto" estas la plej kompleta fonto — post la Enciklopedio — kiun ĉiu laboranto en la fako informado senĉese konsultas.


Oni povas, evidente, skizi raporton pri la laboro de la Informa Fako de UEA, spite de ĝia multflankeco, listigi faktojn kaj citi ciferojn. Sed, la nerektaj efikoj de ties interveno forglitas al ĉiu esploro; ĉar ofte eĉ la plej periferia venko ne estas izolita kaj hazarda okazaĵo, sed rezulto de internacia agordo, de tutmonda organiziteco, de entuziasmiga kapablo de cirkulantaj ideoj, de ĝoje akceptita disciplinon, kiuj influas homojn kaj cirkonstancojn eĉ je distanco de jaroj.

UEA konscias pri tio. Ĝi konscias ankaŭ ke eĉ la plej perfekta informado estas akvoguto en vasta oceano, se ĝi ne marŝas samtempe kun la aliaj du grandaj Movadaj taskoj: Instruado kaj praktika Aplikado de la lingvo. Estus senutile konigi al la homoj la valoron de Esperanto, allogi ilin ĝin eklerni, se malantaŭ ĉio tio ne troviĝus adekvata nombro da kursoj kun adekvataj instruistoj kaj laŭtempaj instrumetodoj, unuvorte, ĉio por tuj transformi scivolulojn en esperantistojn. Kaj estus ankaŭ senutile instrui la Internacian Lingvon se la lernado restus nur teoria forgesota scio, kaj ne vivanta perilo de internaciaj rilatoj. La tri sferoj — Informado, Instruado, Aplikado — estas nedisigeblaj elementoj de unu tuto: la signifo de ĉiu el ili estas en funkcio de la du aliaj.

La Informa Fako estas, do, unu el la aktivecoj de la Asocio, ne la sola, kiu en harmonio kun ĉiuj aliaj kontribuas al la fina enkonduko de Esperanto.

G. C. FIGHIERA

Prezidintoj de UEA . . . 7



Louis Bastien (1869)
Prezidanto de UEA 1933-1936,
Prezidanto de IEL 1936-1948

LA DELEGITA RETO

Ekde la plej frua tempo U.E.A. havis la sistemon de delegitoj. Vasta reto de reprezentantoj etendiĝas tra la tuta mondo. En plej diversaj okazoj ĝi pruvis sian netakseblan valoron. Ne nur ĝi modele servas al la membroj por doni al ili helpon, informojn, konsilojn sur la kampo de profesio, turismo, sociaj cirkonstancoj kaj multspecaj aliaj temoj. Plurfoje ĝi estis ankaŭ valora rimedo por sukcesigi internaciajn enketojn, por okazigi komunan agadon en monda kadro. Krome, kaj gravege, la delegita reto signifas firman ligon de amikeco, solidareco, samideeco kaj fideleco inter plej diversaj homoj de plej diversaj nacioj tra la tuta mondo.

Ekzistas ankaŭ aliaj internaciaj organizaĵoj kiuj havas siajn reprezentantojn en multaj landoj aŭ eĉ en multaj lokoj. Sed ĉe neniu el ili la rilatoj de la reprezentantoj kun la centro kaj de la reprezentantoj inter si estas tiel facilaj, senĝenaj kaj senlimaj. Ĝenerale estas tiel ke la unuopaj reprezentantoj kapablas kun pli aŭ malpli da peno rilati kun la centro en unu aŭ alia lingvo pri la plej esencaj aferoj kaj per tio estas finite. Ne okazas ke ili povas senbremse pri ĉio ajn rilati kun la centro kaj kun siaj kolegoj ĉie ajn. Ne okazas ankaŭ, ke la centro donas al ĉiu el ili samtempe per unu sola cirkulera letero iun ajn sugeston aŭ instrukcion kaj ke tiu estas egale komprenata kaj plenumata en ĉiu angulo de la terglobo. Ni mem konceptas tion kiel tre ordinaran kaj normalan, sed fakte estas fenomeno, ekster la Esperanto-movado ne trovata.

Apartan signifon kaj gravecon havas la reto de

fakdelegitoj. Ĝi havas eminentan valoron pro la praktika aplikado de la Internacia Lingvo. En la postmilita epoko tiu reto multe plivastiĝis kaj pliserioziĝis, sed ankoraŭ ĝi ne estas perfekta. Unika estas la laŭfaka resumo en la jarlibro, post la delegita adresaro, sed ĝi bezonas daŭran ampleksigon. Gravaj profesioj kaj specialismoj ankoraŭ mankas tie, kvankam pluraj aliaj estas bone reprezentataj. Tiu listo estas unu el niaj plej fortaj argumentoj pri la praktika aplikado. Ju pli ampleksa kaj kompleta ĝi estas, des pli forta estas la argumento.

Tiuj esperantistoj kiuj kutimas uzi la servojn de la delegitoj kaj fakdelegitoj kaj regule kontaktas siajn samprofesiulojn en plej diversaj landoj, spertis plej valoran plilarĝigon de siaj konceptoj kaj pliriĉigon de siaj scioj.

Unu el la gravaj taskoj de U.E.A. en la venonta epoko, en kiu fakte povos helpi ĉiu unuopa membro, devas esti daŭra plivastigo kaj plibonigo de la delegita reto.

M. H. V.

La apliko de moderna tekniko al nia agado

Esperanto venis en la mondon dum la epoko de la individuo kiam unuopuloj aŭ malgrandaj grupoj en siaj anguletoj proprainiciate kaj, plej ofte, proprakoste faris la laboron. La vorto „planado" ankoraŭ ne aŭdiĝis, kaj sendependeco estis la favorata doktrino. Sola, D-ro Zamenhof ellaboris la lingvon kaj pritraktis ĝian fruan evoluon, kiu dependis de la hazarda entuziasmigo de soluloj. Tial ĝi ekburĝonis en iu loko kaj poste velkis tie kiam la koncernita individuo ne plu povis aŭ volis laboradi. Ĉiu kiu deziris disvastigi la lingvon plej ofte devis mem denove ellabori la rimedojn kaj materialon, kaj oni ne povis kalkuli ke samtempe en kelkaj landoj estos faritaj kunordigitaj klopodoj. Tamen, spite ĉion ĉi, okazis la miraklo de la starigo de mondmovado esperantista, sed grandega amaso da laboro farita de esperantistoj pereis pro manko de subteno, ekzemple, de paralela agado en aliaj lokoj. Des pli ni ŝuldas dankon al niaj antaŭuloj kiuj spite la evidentan eblecon ke ilia laboro estos vana daŭrigis ĝin kaj ne permesis ke la flameto de Esperanto estingiĝu.

Nuntempe, scienca esploro evoluis tiel ke tiucele miloj da milionoj da pundoj estas elspezataj ĉiujare de registaroj, internaciaj organizaĵoj, ŝtataj institucioj, industriistoj ĉiuspecaj, kaj kasaj fondaĵoj kiel tiuj de Nobel, Rockefeller kaj Nuffield. Se organizaĵo tia faras deklaron ĝi havas pli da efiko ol la deklaroj de la individuoj kiuj apartenas al ĝi kaj nur simila organizaĵo povas efike kontraŭstari ĝin. Tial necesis ke ni havu sciencesploran fakon ne nur por doni fidindan informon sed ankaŭ por ke ĝiaj konkludoj estu subtenataj de la aŭtoritato kaj prestiĝo de la fakuloj de la movado.

Feliĉe por la movado, D-ro Lapenna konstatis la bezonon kaj prezentis konkretan planon, kiun la tiama Estraro akceptis en aŭtuno 1951. Sed de kie havigi eĉ etan sumon rilate al la kosto de tia entrepreno? Neniu el la kuratoroj de la grandaj fondaĵoj ŝajnis deziri helpi nin. Do ni devis turni nin plejparte al nia sola kapitalo, la senpaga volonta laboro de kompetentaj esperantistoj tra la mondo. Feliĉe D-ro Lapenna kiel profesoro de internacia juro kaj internaciaj rilatoj kies scio de sep lingvoj, inter ili tiuj plej bezonataj en tia internacia laboro, povis trovi sufiĉan liberan tempon ekster sia fako por fariĝi Honorofica Direktoro de la nova Centro de Esploro kaj Dokumentado. Li planis la agadon kaj persvadis kompetentulojn en multaj landoj fariĝi kunlaborantoj tiel ke C.E.D. ekfunkciis la 1an de januaro 1952. Sesjara feliĉa kunlaborado kun preskaŭ cent fakuloj havigis la materialojn, kiuj ne nur estas la bazo de elstaraj rezultoj kiel tiu de Mnotevideo, sed ankaŭ provizas la dokumentojn kiuj estas vaste kaj tre sukcese uzataj de niaj aktivuloj en multaj landoj. Kiom ofte, antaŭe, oni petegis nin skribi aŭ sendi artikolojn al gazetoj, sed ni devis rifuzi eble ĉar niaj vivkondiĉoj postulas nian forton kaj malhelpas ke ni povu kolekti la faktojn kaj verkadi eĉ se ni havas la talenton tion fari. Sed nun niaj organizaĵoj

Prezidintoj de UEA . . . 8



Ernfrid Carl Malmgren
Prezidanto 1948-1957


tra la mondo povas ricevi la CED dokumentojn kaj artikolojn, kiuj estas uzeblaj post nura traduko aŭ povas esti la bazo de propra verkado kaj tiel ŝpari multan tempon kaj certigi ke la faktoj estas pravigeblaj. Ekzemplo de tiuj dokumentoj estas aĉetebla, nome, la CED libro „La Internacia Lingvo". Por doni nur unu plian ekzemplon, CED eldonis dokumenton verkitan de D-ro Lapenna pri la sepdekjara jubileo de Esperanto. Ĝi aperis en Esperanto kaj en la angla traduko. Poste Esperanto Press en Kanado reeldonis ĝin en kelkmiloj da ekzempleroj en la angla traduko. Ankaŭ miloj da ekzempleroj estis eldonitaj en la franca, pola, germana kaj nederlanda lingvoj. Artikoloj pri la sama temo aperis en gazetoj kaj revuoj de minimume 14 landoj. La eldonnombro de tiuj ĉi gazetoj estas pli ol 15 milionoj da ekzempleroj. Tio ĉi estas vere mondskala laboro, farita tiel ke oni povas montri al la eldonintaj redaktoroj la vastecon kaj la forton de la lingvo kaj de nia organiziteco. Ĉu vi povas imagi tamen ke iu asocio povas lasi tian dokumenton resti en sia oficejo kaj fari nenion, tiel ke neniu gazeto en la lando publikigis vorton pri la sepdekjara jubileo de Esperanto. Tamen tiel estis. Do, se en via lando ne diskoniĝas novaĵo pri la materialoj kaj artikoloj, kiujn sendas CED, petu la nacian asocion kio okazis al ili, ĉar ili vere estas materialo el kio povas esti forĝitaj urĝe bezonataj iloj. Ili ne nur helpas en la strebo firmigi Esperanton en la mondo, sed ankaŭ al esperantistoj donas plezurigan informon.

La kolektado, studado kaj ordigo de dokumentoj kaj la eldonado de propraj dokumentoj estas nur parto el la funkcioj de CED ĉar al ĝi, kun fido, turnas sin multspecaj sciencesploraj organizaĵoj por objektiva kaj dokumentita takso de la demandoj kiuj leviĝas el lingvaj malfacilaĵoj kaj la solvo de ili. Aparte gravas ke CED zorgas ke UNO kaj UNESKO kaj aliaj gravaj internaciaj organizaĵoj estu informitaj pri la atingaĵoj de Esperanto en la plej diversaj kampoj de iliaj aktivecoj, kaj kontraŭstaras malĝustajn asertojn.

Kaj kiom estas la kosto de CED al la movado? Pasintjare, sepcent pundoj, kiuj estis provizitaj per subvencio de UEA kaj donacoj de kelkaj naciaj asocioj, grupoj kaj individuoj. Tiu sumeto kovris la oficejon, ekipaĵon, paperon, poŝtkoston kaj la salajreton de la sola sekretariino, kiu plenumas la tutan teknikan laboron. Por fari komparon, ĵus la Brita Registaro starigis esplorgrupon por relative nekomplika enketo pri la salajroj de ŝtatoficistoj. La ĉiujara kosto nur por salajroj estos pli ol kvardek mil pundoj. Tio ebligas al vi iomete mezuri la valoron de la laboro de la Direktoro kaj la kunlaborantoj de CED. Ni honoru ilin per uzado de la fruktoj de ilia laboro dum la nuna kvindekjara jubileo de UEA kaj la venontjara jubileo de la naskiĝo de D-ro Zamenhof.

H. W. Holmes

Prezidanto de UEA



Prof. D-ro Giorgio Canuto

DONACOJ POR CED

	£	ŝ	p
Stato je la 7-a de februaro 1958	8.	4.	3
S-ino G. W. Langtree, Britujo		10	
S-ro Sydney Ackers, Britujo		10	
F-ino Lemonnier, Francujo		16.	6
S-ro P. D. Cameron, Britujo	1		
S-ro D-ro Maillard, Francujo		16.	6
Donaco N.N.	1.	8.	2
S-ro D-ro F. Seidel, Germanujo		8.	6
S-ro G. Jocham, Germanujo		7.	10
S-ro L. de Azeredo Continho, Brazilo	1.	1.	5
F-ino C. Zorgdrager, Nederlando		9.	5
S-ro P. M. Mabesoone, Nederlando	4.	13.	11
S-ro H. V. Rasmusen, Danlando		10.	3
S-ro P. Angerer, Aŭstrujo		8.	4
S-ro H. V. Rasmusen, Danlando (dua donaco) .		10.	3
La stato je la 6-a de marto 1958	21.	15.	4

Al ĉiuj donacintoj plej koran dankon. Donacojn por CED oni povas sendi al la Centra Oficejo de U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam-C., Nederlando; al Unuiĝo Esperantista Franca, 34, Rue de Chabrol, Paris X, Francujo; al ĉefdelegitoj aŭ perantoj de U.E.A. aŭ al CED rekte je la nomo kaj adreso de ĝia direktoro: 77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Britujo.


LA JUNA VIVO

Ĉion por la redakcio de „L. J. V." sendu al:

Nicola Minnaja,

Viale Giulio Cesare 223, ROMA, Italujo

HOMBURG (SARLANDO)



La historie interesa „Kastelmonto", hodiaŭ kovrita per belega foliarbaro, estas ekde jarcentoj centro de pli kaj pli disvastiĝanta loĝregiono. La subdistrikta ĉefurbo Homburg, situanta en bela pejzaĝo, nombras ĉirkaŭ 26 mil enloĝantojn. Ĉe la urba periferio kreskis grandaj industriaj entreprenoj. Verdaj areoj maldensigas la urban bildon kaj tuŝas la arbarojn de la ĉirkaŭaĵo. Homburg, la industria urbo en la verdo, trafika, ekonomia kaj kultura centro de la iama palatina parto de Sarlando, disponas pri rimarkindaj sportejoj, interalie la arbara stadiono, kiu havas lokon por 30 mil vizitantoj, subĉiela naĝejo kun moderna akvocirkula instalaĵo, ok tenisejoj, radŝuejo, granda sabla areno por internaciaj motorvetkuroj kaj bicikla kurejo.

Ŝanĝoplena historio alportis al la urbo ĉe la malsupro de la „Kastelmonto" gloron, sed ankaŭ mizeron. Generacioj de burĝoj kaj komercistoj, entreprenistoj kaj laboristoj en komunaj strebo kreskigis la urbon al la nuna signifo. Konsilantaro kaj administracio de la urbo akcelis energie la prosperadon de la urbo, fidelaj al la simbolo de la urba blazono, kiu montras verdfolian arbon. Tiamaniere Homburg kun la mondvastaj rilatoj de sia varia industrio estas maljuna kaj juna urbo, plenigita de la spiro de la nova tempo kaj ensorĉita de la rememoraĵoj pri glora pasinteco.

Homburg situas favore ĉe la tranĉpunkto de la fervojaj linioj kaj stratoj Mannheim-Kaiserslautern-Homburg-Saarbrücken-Parizo kaj Pirmasens-Zweibrücken-Homburg-Neunkirchen-St. Wendel-Koblenz. La konstruata federacia aŭtostrato Kaiserslautern-Homburg-Saarbrücken alportos plian komunikon al la internacia trafika reto. De la nova Homburga stacidomo multaj aŭtobuslinioj kondukas al ĉiuj lokoj de la proksima ĉirkaŭaĵo. De Homburg la vojaĝanto atingas komforte ĉiujn aliajn urbojn de Sarlando kaj de Palatinujo.

La foirejo kun domgrupoj el la 17-a jarcento estas hodiaŭ la centro de la komerca urbo. En la 15-a jarcento Homburg ricevis la foirajn rajtojn. La foirvilaĝo urbiĝis antaŭ kvarcent jaroj, en junio 1958.

La dek du reliefoj de la Karlsbergfontano montras la plej gravajn epokojn de la urba historio, interalie la agadon de Siebenpfeiffer kaj de Wirth, la spiritaj patroj de la Festo de Hambach (1832) en Homburg.

En tuja proksimeco de la famkonata Schlossberg-hotelo kuŝas la ruinoj de la iama Hohenburg. Post la regado de la grafoj de Homburg kaj Nassau-Saarbrücken la Hohenburg transformiĝis per Vauban, la fortikaĵarkitekto de Ludoviko XIV, en fortan militan remparon. La ruinoj de la kastelo kaj de la fortikaĵo estas monumentoj de la pasinteco meze de bone prizorgataj, vastaj parkoj sur la altaĵo de la monto.

Homburg, la „Urbo de la Arbo", prezentas agrablajn eblecojn por ferii. Bonaj hoteloj, gastejoj kaj kafejoj invitas al restado. Belaj promenvojoj kondukas la migranton al la Karlsberg, loko de la oficiala loĝejo de la duko Karl August de Zweibrücken, konstruita ĉirkaŭ 1780, 1,5 km longa. La Karlsberg, la plej bela kaj plej granda eŭropa loĝejo de la 18-a jarcento, estis komplete detruita en la jaro 1793. Parto de la artaĵoj, pentraĵoj, mebloj kaj arĝentaj servicoj iris al Munkeno.

Sur la tereno de la Karlsberg, kiu hodiaŭ estas kovrita per belega miksarbaro, oni lastatempe efektivigis ampleksajn elfosadojn. Kun la elfosadoj de Hornbach (la tombo de Pirminio) kaj kun la tereno de la proksima monaĥejo Wörschweiler ili apartenas al la rimarkindaj kulturhistoriaj lokoj en la lando ĉe rivero Blies.

Modernaj konstruaĵoj kiel la subdistriktestra oficejo kaj la ŝtata realgimnazio por knabinoj anstataŭis malnovajn domojn detruitajn dum la lasta milito. Ankaŭ la ŝtata realgimnazio por knaboj estas pligrandigita nun. Aliaj grandaj konstruaĵoj estiĝas. Dank' al la granda areo (46 kv.km) Homburg havas bonajn evolueblecojn.

Homburg estas la sidejo de la medicina fakultato de la Universitato de Sarlando. Meze de granda arbara regiono situas la pli ol 50 konstruaĵoj de la Landa Hospitalo kaj de la universitataj klinikoj, ekipitaj per la plej modernaj instalaĵoj de la scienco. Por malsanuloj ili estas trankvila loko de resaniĝo, por la profesoroj kaj kunlaborantoj laborejo de serioza esplorado, por la studentoj el multaj landoj loko de instruado.

En la „Kastelmonto" troviĝas amplekssa labirinto de vidindaj pluretaĝaj buntsablaj kavernoj, kiuj atingas longecon de kvin kilometroj. Ĉu vi vizitas Homburg por ferirestado, ĉu por kongresoj, ĉu por komercaj aferoj, ĉiam vi estos kore bonvenaj.

Ĉe la malsupro de la grandaj arbaroj en la proksimeco de la idilia Karlsberglageto kaj de la subĉiela naĝejo troviĝas unu el la plej malnovaj ekskursgastejoj en la urba regiono, la „Schiesshaus" (Pafdomo). Apude estas la nova kampadejo.

Ĉi tiu urbo vokas vin ĉiujn al la 14-a Internacia Junular-Kunveno.

Venu amase!

La aliĝiloj estas riceveblaj de la LKK aŭ de la landaj perantoj (vidu la januaran numeron). **LKK**

INTERNACIA JUNULARKONGRESO EN BERLINO DUM PENTEKOSTO

La distrikta urbestro de Berlin-Neukölln kaj Esperanto-Junularo de Berlino invitas la junajn esperantistojn de la tuta mondo al la granda Internacia Junularkonreso en Berlino dum pentekosto 1958-a (23-30 de majo), en kies kadro okazos la 5-a Interzona Renkontiĝo.

Loko: Moderna lernejo en Berlin-Neukölln. Oni kunvenos, manĝos kaj dormos en unu domo. Tute en la proksimeco estas bela parko, komforta subĉiela banejo kaj grandurba medio.

Programo: Ĝi enhavos: a) Interkonan Vesperon; b) akcepton ĉe la urbestro, viziton de Neukölln; c) Socialistan Matenfeston; ĉ) diservojn; d) teatroviziton; e) aŭtobusan rondveturon tra tuta Berlino; f) referaĵon; g) laborkunsidon; ĝ) okcidentajn kaj orientajn filmojn; h) sportajn kuj kulturajn konkursojn; ĥ) ŝipekskurson; i) Nacian Vesperon; j) Esperanto-ekzamenojn; ĵ) Internacian Balon. (Ŝanĝoj rezervitaj.)

Kotizoj: Por ĉiu (sendepende de aĝo kaj membreco) 32, gm. okc. Ĝi inkluzivas loĝadon, manĝadon kaj programon. Orientuloj kaj aliaj, kiuj havas financajn aŭ vizajn malfacilaĵojn, skribu al la organizantoj. Malriĉo ne estu kaŭzo por nepartopreno! Aliĝo validas nur post pago.

Aliĝfino: 30.4.58.

Veturmono: Se eble, organizu karavanojn! Oni esperas, eĉ povi repagi parton de la veturmono.

Adreso: Esperanto-Junularo de Berlino, Richardstr. 61 Lr, Berlin-Neukölln.

MALLONGAJ INFORMOJ

• Radio Zagreb enkondukis en la kadron de la ĵaŭdaj Esperantaj elsendoj apartan elsendon por la junularo sub la titolo „Junulara Tribuno". Ĝin rekaktos Ivo Osibov. La unua elsendo okazos la 10-an de aprilo.

• En Sofia Ŝtata Universitato la studentoj organizis belan solenaĵon okaze de la gloraj datrevenoj: 70 jaroj de Esperanto kaj 50 jaroj de Bulgara Esperanstista Asocio. La solenaĵon partoprenis ankaŭ universitataj profesoroj. Pri ĝi oni disdonis milojn da flugfolioj-invitiloj por informi la tutan studentaron en la ĉefurbo. La rezulto instigas al imitado. Ĉe la junulara sekcio de BEA estas fondita koresponda servo, al kiu oni ĉiam povas sin adresi: poŝtkesto 44, Sofia. De Centra Komitato de Unuiĝo de la Popola Junularo en Bulgarujo oni povas peti la libreton-albumon „La Juneco de Bulgario", eldonitan en Esperanto en 1957-a; adreso: bul. Al. Stambolijski 11, Sofio.

• Junulara Sekcio ĉe Bulgara Esperantista Asocio intencas eldoni multkoloran propagandan afiŝon, propagandajn poŝtkartojn kaj kovertojn. Ĉiu, kiu volas helpi, estas petata sendi siajn ideojn pri la subjekto aŭ eventuale siajn skizojn al nia bulgara sekcio, poŝtkesto 44, Sofia (Bulgarujo).

• Esperanto-Junularo de Berlino pretigis varbstampilojn propagandcelajn, kiujn oni povas aĉeti je malalta prezo. Ĝi ankaŭ eldonis serion de fotokartoj, kiuj certe helpos nian movadon en Orienta Germanujo kaj aliaj Orientaj landoj; sur ili estas presita portreto de iu mondkonata komunisto, kun iu lia frazo favora al Esperanto. EJB havas ankaŭ je ĉies dispono kajerojn kun poemoj kaj kantoj en Esperanto de Karl Vanselow kaj kantareton „La verdaj paseroj kantas" kun tradukoj de la plej belaj kantoj. Ĉiu povas informiĝi ĉe Esperanto-Junularo de Berlino, Richardstr. 61 Lr, Berlin-Neukölln (Germanujo).

• En la bulteno „Bulgara Esperantisto" apreas konstanta junulara rubriko „Junularo sur posteno" redaktata de Nikola Nikolov. Dum la 33-a bulgara Esperanto-kongreso okazos junulara konferenco.

• Centra Komitato de Asocio Bulgara Popola Junularo, la plej granda junulara organizo en Bulgarujo, korespondas en Esperanto. Lastatempe al tiu ĉi asocio estis direktitaj multaj leteroj petantaj informojn pri la vivo kaj laboro de la bulgara junularo. Oni povas eldoni en Esperanto multe da prospektoj pri tiuj temoj, se la alveno de tiaj leteroj ne ĉesos en proksima tempo. Do ĉiuj legantoj estas invititaj, direkti informpetojn al: Centra Komitato de Asocio Bulgara Popola Junularo, bul. Stambolijski 11, Sofio.

• Ĉijare la Oratora Konkurso, okazonta dum la Universala Kongreso, disponos pri digna premisumo: al la 100 markoj tiucele destinitaj de LKK, UEA aldonis 50 markojn. La unua premio estos kontante 70 markoj, riceveblaj nur por partopreni al internacia Esperanto-manifestacio.

• La Estraro de la Junulara Sekcio ĉe Bulgara Esperantista Asocio havis kunsidon la 31-an de decembro 1957-a. Estis sur la tagordo la problemo pri la aliĝo de la sekcio al TEJO; tiu aliĝo estas unuanime decidita. La sekcio havas 570 gejunulojn kiel regulajn membrojn, kaj ĝi nomas la jenajn tri komitatanojn de TEJO: Petko Petrov Arnaudov, Nikifor Popkonstantinov 38, Pazarĝik; Nikola Iliev Nikolov, Capaev 12-a, Sofio 13; 3) Dobri Stanilov Dobrev, Otec Paisi 45, Sofio 3.

Kvinjara jubileo de esperanto-elsendoj en Zagreb

En aprilo ĉijare la esperanto-elsendoj de Radio Zagreb festas la kvinjaran jubileon. Seninterrompe dum 5 jaroj oni povis ĉiuĵaŭde aŭskulti peraere esperantlingvajn programojn 15-minutajn.


La elsendoj komenciĝis en aprilo 1953 kiel parto de propagando por la 38-a Universala Kongreso en Zagreb. Tiam la elsendojn estris LKK de la UK kaj ĉe la fino de ĉiu programo estis informoj pri la Kongreso. Dum la Kongreso mem, la elsendoj estis ĉiutagaj kaj la nepartoprenintaj esperantistoj povis en siaj hejmoj aŭdi erojn de la Kongreso. Post la Kongreso (aŭgusto 1953) la esperantlingvaj elsendoj fariĝis parto de la programo de Radio Zagreb. Esperantistaj organizaĵoj ne zorgis plu por la elsendoj, sed la tutan laboron kaj respondecon transprenis la kvaropo: D-ro Borovečki kiel ĉefa kaj respondeca redaktoro, Inĝ. Brajan, lia helpinto, Marinka Svetlicic, parolistino kaj Vlado Jurkovic, la teknika reĝisoro. Tiu kolektivo preparis pli ol 100 elsendojn. En oktobro 1956 subite la tri aktivistoj el kvar estis malhelpitaj daŭrigi la laboron por la radio-elsendoj kaj ilin anstataŭis la novaj tri aktivistoj, ge-sanoj: Marko Demetrovic, la respondeca redaktoro, Emilija Lapenna kaj Joso Ŝlat kunredaktoroj kaj parolistoj. La teknika reĝisoro restis la sama.

La radio-elsendoj redaktataj de tiu kvaropo festas la kvinjaran jubileon kaj eniras en la duan 5-jaran periodon.

En sia 5-jara ekzisto Radio Zagreb elsendis pli ol 250 esperantoprogramojn aŭ 4.000 minutojn, 67 horojn.

Dank' al subteno kaj komprenemo de la direkcio de Radio Zagreb, la pasintan jaron estis elsenditaj bonaj raportaĵoj registritaj dum la Internacia Kongreso de Fervojistoj en Rijeka kaj la Universala en Marseille.

La programoj estas ĉiam tre variaj por kontentigi la interesojn de ĉiu aŭskultanto. Apud la novaĵoj el Jugoslavio kaj esperantista movado, la progamoj konsistas el multaj literaturaj, turistaj, historiaj



Kvaropo, kiu preparas ĉiujn esperanto-elsendojn de Radio-Zagreb. De maldekstre dekstren ges-anoj: Marko Demetrović, la respondeca redaktoro; Joso Slat, kunredaktoro, raportisto, parolisto; Emilija Lapenna, kunredaktoro, recenzisto, deklamantino, parolistino; Vlado Jurković, teĥnika reĝisoro.

temoj. La internacia karaktero de la elsendoj estas neniam forgesita: Por la Tago de UN-o kaj UNESCO, de Homaj Rajtoj, Zamenhof, virinoj, Ruĝa Kruco, junularo, ĉiam estas preparitaj specialaj elsendoj.

La elsendoj estas aŭskultataj plejparte en Eŭropo, en preskaŭ ĉiuj landoj, kaj ekster ĝi, en Kanariaj Insuloj, Norda Afriko kaj Azio. La elsendo-horo estas malfrua (23,05 laŭ la Greniĉa tempo, ondolongo 264 m) sed, bedaŭrinde, por nun tiurilata plibonigo estas neebla.

Pli ol 1000 leteroj ricevitaj de la aŭskultantoj pruvas, ke la elsendoj kontentigas la dezirojn de la esperantistaro.

Ĉar la radio-elsendoj estas ne nur ĝuo por la esperantistoj sed grava propaganda rimedo en la batalo oficialigi la Internacian Lingvon, ili bezonas helpon de ĉiu esperantisto. La helpo povas esti malgranda, simpla poŝtkarto, adresita al: Radio Zagreb, Esperanto fako, Zagreb, Jugoslavio. **E. L.**

Alvoko al zoologoj

Dum la tagoj 18.—23. julio 1958 okazos en Londono la XVa Internacia Kongreso de Zoologio. Dum la lasta kongreso de zoologio, en Kopenhago antaŭ 5 jaroj, mi ne sukcesi trovi aliajn esperantistojn, kaj sekve ne estis eble montri tie la efikecon de nia Lingvo. Mi nun alvokas ĉiujn esperantistajn zoologojn, kiuj intencas partopreni la kongreson en Londono, skribi al mi antaŭe, por ke ni povu renkontiĝi dum la kongreso. Grupo de esperante parolantaj kongresanoj sendube vekus atenton pri nia lingvo.

C. Støp-Bowitz
(Komitatano de U.E.A.),
Universitata Zoologia Muzeo,
Sarsgt. 1, Oslo 45, Norvegujo

INTERNACIA GEOGRAFA ASOCIO

Fakdelegitoj por geografio

IGA (Internacia Geografa Asocio), kies prezidanton Tibor Sekelj multaj Esperantistoj ja konas el liaj raportoj pri lia agado en orientaj landoj, lastatempe en Hindujo, nombras proksimume 200 membrojn, sed en la Jarlibro de UEA ĝis nun aperis eĉ ne unu fakdelegito por Geografio. Tial ni urĝe petas ĉiujn fakulojn kaj kompetentajn amatorojn laŭeble TUJ fariĝi fakdelegitoj.

Same ni alvokas niajn membrojn klopodi fariĝi membroj de siaj lokaj kaj naciaj Geografiaj Asocioj. Tio ĉi estas treege grava por niaj estontaj klopodoj enkonduki Esperanton en la fakan medion. Tuj kiam vi fariĝos delegito de UEA aŭ membro de iu faka organizo, bonvolu informi pri tio la sekretarion de IGA, por registro.

Ordigo de geografiaj nomoj en esperanto


Laŭ propono de la prezidanto de IGA (Internacia Geografa Asocio) Tibor Sekelj kaj akcepto de la prezidanto de la Akademio de Esperanto ambaŭ institucioj, IGA kaj la Akademio eklaboros per kunigitaj fortoj por la solvo de la ĝena kaj dum jardekoj diskutata problemo de la GEOGRAFIAJ NOMOJ en ESPERANTO. Ambaŭ institucioj elektos po kvin el siaj fakuloj pri tiu temo, kiuj sub la gvidado de ambaŭ prezidantoj pridiskutos la temon unue teorie kaj poste, kiel praktika konkludo, kreos maparon esperantan, eldonante unue Mondmapon, poste tiujn de opaj kontinentoj kaj fine de la opaj landoj.

La laboro estos longa kaj nefacila, sed por atingi la celon, iam oni devas komenci. Dum la Jarkunveno de IGA en Majenco, okaze de la 43-a UK, ĝeneralaj bezonoj de la kunlaboro estos diskutataj. Ni jam nun atentigas la interesitajn fakulojn pri nia kunveno kaj petas pri koncizaj sugestoj tiurilataj.

IGA, sekr. W. von der Ley,
Ulrichtstr. 18, Taiflingen/
Württ., Germanujo.

En Gresillon

Dank'al Esperanto, lernu la francan lingvon



De la 27-a de julio, ĝis la 10-a de aŭgusto, sub la patronado de la Franca Ministro pri Edukado, okazos kurso, kies celo estas instrui la francan lingvon pere de Esperanto.

Dujara eksperimento permesis starigi taŭgan programon, por kontentigi ĉiujn ĉeestantojn; eĉ la Francoj, kiuj grandnombre aliĝas ne nur multe helpas, sed ankaŭ multe profitas.

Kiamaniere okazas la kurso? Ni lasu la parolon al la kutimaj respondeculoj:

Matene, gramatika kurso; kompreneble, oni instruas nur la esencon, sed tiamaniere, ke la lernantoj bone komprenu, kiel esprimi la agojn, laŭ la voĉo (aktiva—pasiva), laŭ la tempo, la loko, la diversaj cirkonstancoj; la vortojn oni do instruas per kompletaj frazoj esprimantaj ideojn. Plie, oni dediĉas sufiĉe da tempo al la franca konjugacio; ĉiu scias, kiel terure komplika ĝi estas!

Posttagmeze, la lernantoj devas solvi la kutimajn problemojn, antaŭ kiuj ĉiumomente troviĝas eksterlandano en Francujo: en hotelo, restoracio, ĉe la poŝtoficejo, ĉe la stacidomo, kaj en la diversaj butikoj. Legado de klasikaj aŭtoroj kompletigas la posttagmezan programon.

Vespere, oni vidas filmojn, lernas francan kanteton, aŭ ĉeestanto parolas pri sia lando aŭ regiono. Oni ankaŭ ludas kaj dancas.

Tia programo, ne tro rigida, permesas al la tuta ĉeestantaro plene profiti la restadon en amikeca etoso.

Konklude, ni citas la opinion de du eksterlandanoj, kiuj partoprenis la 1957-an kurson. La unua diras: „La kurso estas ege interesa, ĉar oni tute forgesas sian nacian lingvon: oni pensas nur france aŭ esperante"; kaj la alia: „Mi opinias, ke mi multe progresis; tio kuraĝigas min daŭrigi tiun lernadon; mi okupos miajn longajn vintrajn vesperojn per plia studado de la franca lingvo".

Jam la detala programo de la kurso estas preta; ĝi aperis en la unua numero de niaj „Kajeroj el Grésillon".

Oni petu ĉiujn informojn de: Esperantista Kulturdomo, Kastelo de Grésillon, **Baugé** (Maine et Loire), Francujo, aldonante respondkuponon.

Presata!

BELARTO

Mendu tuj

2,75 gld. (11 steloj)

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1958

Stato je la 28-a de februaro 1958.


Konkurso I

	Lando	*Kvoto*	*Poentoj*	*%*
1.	Brazilo	7011	5699	81.27
2.	Britujo	6963	5046	72.47
3.	Nederlando	5567	3950	70.95
4.	Svedujo	6945	4900	70.55
5.	Usono	3225	2170	67.29
6.	Germanujo	6865	4402	64.12
7.	Svislando	2185	1400	64.07
8.	Francujo	7647	4744	62.04
9.	Finnlando	2765	1675	60.58
10.	Danlando	2743	1660	60.52
11.	Belgujo	1907	1143	59.94
12.	Hispanujo	2508	1350	53.83
13.	Norvegujo	2144	1040	48.51
14.	Pollando	6150	2715	44.15
15.	Jugoslavio	3800	1545	40.66
16.	Italujo	4030	925	22.95

Konkurso II

	Lando	*Kvoto*	*Poentoj*	*%*
1.	Izraelo	240	220	91.67
2.	Kanado	440	355	80.68
3.	Portugalujo	560	440	78.57
4.	Japanujo	1280	1005	78.57
5.	Aŭstralio	1228	820	66.77
6.	Aŭstrujo	1505	780	51.83
7.	Sudafriko	235	120	51.06
8.	Maroko	659	319	48.41
9.	Urugvajo	414	145	35.02
10.	Novzelando	955	380	29.80
11.	Islando	315	85	26.98
12.	Argentino	1005	140	13.93

Ni Funebras



Paul Nylén (20.6.1870-14.1.1958). La sveda movado perdis sian bravan pionir-on. Jam en 1892 Nylen eklernis Esper-anton, kaj de tiam neniam plu rezignis laboradi por nia afero. En 1897 aperis la unua eldono de lia esperanto-sveda vortaro, kies plej nova eldono aperis antaŭ nur kelkaj jaroj. Li ĉeestis la fondon de la sveda movado, estis dum multaj jaroj ĝia prezidanto kaj poste ĝia honora prezidanto. Li iniciatis la Svedan Esper-anto-Instituton kune kun aliaj, kaj faris grandan laboron en la servo de tiu in-stituto. Li estis Akademiano. Estas ne-eble eĉ resumi liajn grandajn meritojn en la sveda kaj monda movadoj. Oni povas nur danke rememori pri li kaj tiri in-spiron el lia ora ekzemplo.

ŜAKA RUBRIKO

Gvidas: Dro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio

Unua malgajno de mondmajstro Smys-lov. Ludita en Baden 1957.

Filip (Ĉeĥoslovakio)—Smyslov (So-vetio).

1. Ĉg1-f3 Ĉg8-f6 2. c2-c4 b7-b6. Tiu ĉi defenda sistemo ne estas tro pretendema. Nigro gajnas maksimume egalan ludon. **3. g2-g3 Kc8-b7 4. Kf1-g2 e7-e6 5. 0-0 Kf8-e7 6. b2-b3.** Nun oni jam laboras en teorio de malfermo kun plej etaj sub-tilaĵoj. Blanko intence atendas kun mo-bilizo de ĉevalo bl, por ke li ne donu al nigro eblecon malpezigi al si per movo Ĉe4. **6. . . . 0-0 7. Kc1-b2 d7-d5** 8. **d2-d4, d5xc4 9. b3xc4 c7-c5 10. e2-e3.** Grava movo, per kiu blanko ne nur tenas super-econ en centro, sed ankaŭ liberigas kam-pon e2 por sia damo. **10 . . . Ĉb8-d7 11. Dd1-e2 Ta8-c8 12. Tf1-d1.** De ĉi tie komencas klare montriĝi diferenco en dislokigo de fortoj de ambaŭ tendaroj. Nigro deflankigas al konata kaj ŝablona manovro kaj translokigas damon sur a8. Tio kostas tro da tempo. **12 . . . Dd8-c7 13. Ĉb1-d2 Tf8-d8.** Ĉi tie estis konvena momento al movo Ĉc4. **14. Ta1-c1 Dc7-b8 15. Kg2-h3.** Li ne volas permesi inter-ŝanĝon de kurieroj sur diagonalo a8-h1. **15 . . . h7-h6 16. Ĉf3-e1 Db8-a8.** Post for-iro de blanka kuriero sur h3 la pozicio de damo sur a8 estas senefika. Kontraŭe, nigra damo estas malproksimigita de ba-talejo. **17. Ĉe1-d3 c5xd4.** Se tiu ĉi inter-ŝanĝo estas necesa, do tio signifas, ke nigro strategie malgajnis batalon el mal-fermo. La atendanta Kf8 estis pli sin-gardema. Sed nigro evidente sentis rigid-an dislokigon de siaj fortoj. La movo d4-d5 pendas en aero kaj la efiko de kuriero h3 estas tre malagrabla. **18. e3x d4 Td8-e8 19. Td1-e1 Ke7-f8 20. f2-f4 Tc8-d8 21. a2-a3.** Por malebligi al nigra kuriero surpaŝi sur kampon b4 kun inter-ŝanĝo sur d2. **21 . . . Ĉd7-b8 22. Ĉd3-e5 Ĉb8-c6 23. Ĉd2-f3 Ĉc6xe5 24. Ĉf3xe5 Kf8-d6 25. c4-c5 b6xc5 26. d4xc5 Kd6x e5 27. Kb2xe5 Kb7-f3.** Esperon je savo donis Ĉd5. **28. De2-b2 Da8-c6 29. Ke5x f6 g7xf6 30. Db2xf6 Td8-d5 31. Te1-e5.** Kompreneble ne 31. Dxh6 Th5!!

31 . . . Te8-d8 32. Df6xh6 Td5xe5 33. f4xe5 Td8-d4? Smyslov malatentas, ke post Td1 + 34. Txd1 Dc5 + havos remison. **34. Dh6-g5 + Rg8-f8 35. Kh3-f1 Dc6-d5 36. Dg5-e3 Td4-d1 37. Tc1x d1 Dd5 x d1 39. De3-d3 Rf8-e7 39. Dd3x d1 Kf3xd1 40. Rg1-f2 f7-f6 41. e5xf6 + Re7xf6 42. Rf2-e3 Rf6-e5 43. Kf1-g2 kaj nigro rezignis.**


(Rimarkigojn de int. majstro K. Opo-censky el Rudé právo esperantigis f.)

Solvo de problemo Nro 1 (el Esperan-to nro 623): Ĉh7-f8. Ĝis fino de januaro venis solvoj el 10 landoj.

Problemo n-ro 4

N. Mansurov, Sovetio.

Originalo en Ĉs. ŝach n-ro 10/57.



Mato en du movoj.

Kontrolo: B1. Rb7, De4, Th5, Th7, Ke6, Kh8, Ĉb5, Ĉg5, P.a4, c3.

Ni: Rc5, Te5, Kh1, Kh2, Ĉe7 P. a6.

Solvojn sendu al gvidanto de la rubri-ko ĝis 31.7.1958.

Korespondŝakaj turniroj. Unuaj grupoj de niaj korespondturniroj jam ekstartis. Vi povas aliĝi al novaj grupoj, kiuj ko-menciĝos en plej proksima tempo. Aliĝ-kotizo: 10 poŝtaj respondkuponoj (el landoj, kie tiuj rk. ne ekzistas, oni pagas nenion). Aliĝojn sendu al s-ro Jean Du-thilleul,35 Rue de Bayeux, Caen, Fran-cujo.

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj: I = Informoj, P = Parolado, K = Kurso.

Dimanĉo	10.17-10.30	Rio de Janeiro, 30.78m, 25.48m. K.I., L.B.V., Av. Rio Branco 43-3°-Rio de Janeiro (D.F.) Brazilo.
	14.00-14.15	Piraçununga, 198m. K. Rádio-Difusora ZYI 3, Piraçunun-ga (Sao Paulo), Brazilo.
	19.00—19.25	Sofia, 49.42m, 39.11m. P. Radio Sofia, Bulgarujo.
	22.30—22.55	Sofia, 39.11m, 30.93m, P.
	23.35—23.55	Bilbao, 265m. P. Radio Bilbao, Hispanujo. (Horo variebla dum unuhora diverslingva programo.)
Lundo	17.30—17.35	Bern, 48.66m, 31.46m, 16.87m, 13.94 m. P. (D-ro Baur.) SRG., Kurzewellendienst, Neuengasse 23, Bern, Svis-lando.
	18.10—18.30	Valencia, 233m, P. La Voz de Levante, Valencia, His-panujo.
	22.40-22.57	Hilversum, 402m., P. N.C.R.V., Schuttersweg 8, Hilver-sum, Nederlando (nur la unuan lundon de ĉiu monato).
Mardo	00.45-01.00	San José. 192m. P. Radio Welcome CW47A, San José, Urugvajo.
	11.55-12.00	Bern, 48.66m, 31.46m, 13.94m, 11.70m. P. (D-ro Baur).
	15.00-15.10	Ljubljana. 327m, 221m. K. Radio Ljubljana, Jugoslavujo.
	16.40-16.50	Wien. 208m., 48.74 m., 25.46m. I. Radio Wien, Argen-tinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	17.10-17.30	Stockholm, 32.30m., 26.50m., 20.20m., K. Radio I.B.R.A., Poŝtfako 821, Stockholm I, Svedujo.
	17.55-18.10	Roma. 50.34m, 41.24m, 30.90m. P. Radio Roma, Casella Postale 320, Roma, Italujo.
	19.00-19.15	Stockholm, 32.30 m., 26.50 m., 20.20 m. P. (nur la lastan mardon de ĉiu monato).

43-A UNIVERSALA KONGRESO

Mainz — 2-9 aŭgusto 1958 — Germanujo

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 6 Marto 1958

Novaj Fakkunvenoj:

Anoncas Fakkunvenon:

— Eŭropa Lingvo-Kampanjo: „Enketo inter Eŭropaj Urbestroj pri eksperimenta instruado de Esperanto surbaze de internacia konvencio". Adreso: D-ro W. Herrmann, Bürstädterstr 3, (16) Lampertheim/Hessen, Germ.

— Internacia Ligo Esperantistaj Fervojistoj: „Raciigado-Modernigado-Aŭtomatigado ĉe la Germana Federacia Fervojo". Adreso: Joachim Giessner, Hauptbahnhof 6, Braunschweig, Germanujo.

— Internacia Geografa Asocio. Adreso: S-ro W. von der Ley, Tailfingen/Württ. Ulrichstrasse 18, Germanujo.

— Internacia Ligo Esperantistaj Instruistoj, F-ino Violet Nixon, 183 Woodlands Park Road, Bournville, Birmingham 30, Britujo.

— Internacia de Militrezistantoj: „La gemanaj pacifistoj alfronte al la deviga militservo". Adreso: Alfred G. Tucker, Birchcroft, Pilgrims' Way, Harbledown, Canterbury, Britujo.

— Universala Ligo: Parolado de Prof. Edmond Privat. Adreso, U.L., Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando.

— Kristana Esperantista Ligo Internacia: „Nacia kaj internacia politiko en la lumo de la Evangelio". Adreso: S-ro D. de Boer, Druivenstraat 32, Den Haag, Nederlando.

— Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista: „Esperanto kaj la katoliko. Kiel oni povas varbi la katolikajn esperantistojn por IKUE? La katoliko kaj la neŭtrala Movado."
Adreso: Pastro Thalmaier, Ludwig Gräfelfing bei München, Bahnhofstrasse 18, München, Germanujo.

Framasona Kunveno:

Universala Framasona Ligo invitas la framasonojn esperantistajn el kiu ajn lando kaj rito al Loĝia kunveno. Adreso: Carl Barthel, Wöhlerstrasse 14, Frankfurt, Germanujo.

Internacia somera universitato:

S-ro Ivo Rotkvič prelegos pri „Traduki artverkon — ĉu utopio?"

Specialaj vizitoj:

La bierfarejo „Aktien Mainzer Bier" akceptos kun regalo 90 kongresanojn.
La ŝaŭmvinfarejo „Kupferberg" akceptos kaj regalos 360 kongresanojn.
Interesuloj devas sin antaŭanonci por unu el la du vizitoj per simpla poŝtkarto al la Kongresa oficejo.
La Atomika Laboratorio de la Mainza Universitato akceptos ĉ. 20 fizikistojn, sciencistojn kaj aliajn specialistojn por faka vizito.

Nova filmo:

La Urbo Mainz decidis eldoni en Esperanto sian filmon „Sur la postsignoj de la pasinteco". La filmo estos unuafoje prezentata dum la Universala Kongreso.

Statistiko:

(ĝis fino de februaro) Aŭstrujo 25, Belgujo 21, Brazilo 3, Britujo 94, Bulgarujo 5, Danlando 41, Etiopio 1, Finnlando 5, Francujo 208, Germanujo 372, Grekujo 1, Hispanujo 7, Hungarujo 6, Islando 6, Israelo 1, Italujo 55, Japanujo 2, Jugoslavio 32, Maroko 3, Meksiko 1, Monako 3, Nederlando 65, Norvegujo 9, Novzelando 2, Pollando 7, Portugalujo 2, Sudafriko 1, Svedujo 77, Svisujo 27, Urugvajo 1, Usono 8. Entute 1091 el 31 landoj. (Pasintjare 673 el 29 landoj.)

G. C. Fighiera
Konstanta Kongresa Sekretario

Merkredo	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	22.50-23.00	Hilversum, 298 m., I, V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum.
Ĵaŭdo	0\8.30-08.40	Paris. 280m., 235m. K. Esperanto-Office, Orléans(Loiret), Francujo.
	11.55-12.00	Bern. Kiel marde P. (D-ro Privat.)
	23.05-23.20	Zagreb, 264 m. P. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
	23.30-24.00	Sao Paulo, 62.83 m. I.K. Rádio Progresso, Sao Paulo, Brazilo.
Vendredo	00.45-01.00	San José. Kiel marde.
	17.30-17.35	Bern, Kiel lunde. P. (D-ro Privat).
	17.55-18.10	Roma. Kiel marde.
	21.30-21.45	Guatemala Cd. 470m, 197m, 47m, 30.50m. I. Radio-Esperanto, La Voz de Guatemala. Mez-Ameriko.
	21.45-21.57	Vich, 193m. K. Radio Vich (Barcelona), Hispanujo.
Sabato	18.30-19.00	Rio de Janeiro, 375m., 25.10m. K.I. Radio Ministério da Educaçao, Praça da República 141A, Rio de Janeiro (D.F.), Brazilo.
	21.00-21.20	Rio de Janeiro, 214m. K. Radio Roqete Pinto PRD5, Rio de Janeiro, Brazilo.
	22.15-22.22	Hilversum, 402 m., P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Radio Roma. 1-IV, Tra la literaturo; 4-IV, Sankta Vendredo; 8-IV, Mattia Battistini, baritono; 11-IV, Novaĵoj el Italujo; 15-IV, Veterana Esperantista Klubo; 18-IV, Leterkesto kaj bibliografio; 22-IV, Vilaoj de Tivoli; 25-IV, La sporto en Italujo; 29-IV, Italaj kanzonoj kantataj en Esperanto. Krome, ĉiun merkredon: Kuriero de Esperanto. Prelegantoj: D-ro Vincenzo Musella kaj S-ro Luigi Minnaja.

Radio Zagreb. 3-IV, Pri la jugoslava junularo (Ivo Osibov); 10-IV, Memore al la mortotago de la Majstro (Ivo Rotkvic); 17-IV, Makedonio en historio kaj hodiaŭ (Joso Šlat); 24-IV, Novaĵoj el Jugoslavio kaj respondoj al korespondantoj.

A l v o k o

Okaze de la 43a Universala Kongreso de Esperanto en Mainz oni montros denove la Universalan Ekspozicion de Esperanto, tiun eksterordinare konvinkan pruvilon pri la kulturaj valoroj kaj ĝisnunaj akiraĵoj de la Internacia Lingvo. Ĝi havos lokon en la mondfama Gutenberg-Muzeo (konstanta ekspozicio pri presartaj aferoj), kiun la urbo Mainz grandanime disponigis al la Universala Ekspozicio.

Bedaŭrinde la materialo de la Ekspozicio ankoraŭ ne estas kompleta, malgraŭ la modela oferemo de la Esperantistaro. Mankas ankoraŭ multaj gravaj objektoj (libroj, revuoj, afiŝoj, prospektoj ktp), precipe el la tempo post la Universala Kongreso en Kopenhago (aŭgusto 1956). Mi do nenove devas apelacii al la oferemo kaj idealismo de ĉiu unuopulo. Kiu ne emas fordoni iun por li posedindan objekton, povos ankaŭ pruntedoni ĝin. Ĉar la Ekspozicio disponos pri vitrinoj, neniu bezonos timi, ke io perdiĝos.

Bonvolu sendi la materialon al la adreso de la 43a Universala Kongreso de Esperanto en Mainz kun la indiko: Por la Universala Ekspozicio.

La esperantajn gazetojn mi petas represi ĉi tiun alvokon.

Al ĉiuj koran dankon anticipe.

LEO JOLLIET
Komisiito de CED por la Ekspozicio de Esperanto en Mainz

KORESPONDA SERVO MONDSKALA

Oficiala Servo de U.E.A.

Kiel mi jam skribis en pli fruaj artikoloj, estas multaj landoj, pri kiuj oni ofte ne pensas, petante korespondantojn, kaj kiuj tamen estas tre interesaj. Per kelkaj vortoj mi volas nun, en pluraj sinsekvaj artikoloj, inviti vin al kontaktoj kun tiuj maljuste „forgesataj" landoj.

Pollando. Jes, la naskiĝlando de nia lingvo, landO de ĝia genia eltrovinto, de ĝiaj tiel elstaraj unuaj pioniroj kaj verkistoj: Grabowski, Kabe, ktp., kaj pli poste Jean Forge; la lando, kie nuntempe, kun nova, freŝa sango, reekfloras nia Movado, kie eldoniĝis tiel belaspektaj kaj riĉenhavaj libroj kaj kie aperas unu el la plej luksaj revuoj verkitaj en Esperanto: „Pollando". Jes, tiun **patrujon de Esperanto** oni preskaŭ ĉiam preterlasas en la korespondodeziroj. Kaj dum K.S.M. ricevas preskaŭ ĉiutage belajn leterojn de entuziasmaj gejunuloj, ĝenerale komencantoj, sed kiuj tamen jam tiel bone majstras nian lingvon! Nepre pensu, estonte, pri Pollando!

Hungarujo. Ankaŭ el tiu lando de niaj grandaj poetoj: Kalocsay kaj Baghy, venas multaj leteroj de samideanoj, kiuj petas, ke K.S.M. interrilatigu ilin kun korespondemaj esperantistoj en aliaj landoj. En ĉiu letero, oni sentas la grandan animdelikatecon de tiu popolo, kiu donis al la tutmonda arto, inter aliaj brilaj komponistoj, la universale ŝatatan Franz Liszt. Ankaŭ en tiu lando, Esperanto estas afero serioze rigardata de oficialaj instancoj: tion pruvas la ĵusa eldono de du belegaj poŝtmarkoj honore al Esperanto kaj al Zamenhof. Cetere la mirinde belaj markoj de tiu lando devus esti forta allogaĵo por ĉiu kolektanto. Kiu povus rezisti la alvokon de tiel ĉarmaj kaj simpatiaj homoj?

Mi parolis pri du landoj: tio ne signifas, ke nur tiuj estas interesaj. En postaj artikoloj venos la vico de aliaj landoj, kies meritojn mi klopodos evidentigi. Nun mi povas certigi, ke pri tiuj du landoj vi senprokraste ricevos kontentigon, ĉar abundas, ĉe K.S.M., adresoj el ili.

En la jarlibro 1958 de U.E.A. troviĝas (inter la fakaj asocioj) plenaj klarigoj pri la funkciado de la Koresponda Servo Mondskala. Bonvolu atente legi ilin. Mi nur memorigas, ke ne estos eble al mi rekte sendi adresojn al tiuj, kiuj ne aldonos respondkuponojn; sed ke disponigo de propra adreso (kun respondo al la **ok** punktoj de la demandaro) estas kompreneble senpaga... kaj bonvena!

Mi nun volas danki ĉi tie ĉiujn personojn, kiuj sendis al mi bondezirojn okaze de Kristnasko kaj Novjaro, ĉar mi ne povas persone respondi al ĉiuj. Plej sinceran dankon!

Ĉion pri K.S.M. adresu al:

Daniel LUEZ
LAON (Aisne)
Francujo

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO — La 1-an de marto 1958.

N-ro 303

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de februaro kaj ankaŭ por komparo, je la fino de februaro 1957:

		1957		*1958*
Asociaj membroj		4410		5273
Individuaj membroj				
MJ	504		484	
MA	3689		3428	
MS	538		431	
Pat.	5		5	
DM	298		296	
HM	52		46	
JMJ	4		9	
JMA	45		59	
		5137		4758
		9547		10,031

DELEGITOJ

Aŭstralio

Canberra (A.C.T.) FD (tajloraj aferoj): Vakas.

Redcliffe (Queensland) D: S-ino Violet Fraser, dommastrino, 76 Prince Edward Parade, Queen's Beach.

Sydney (New South Wales) FD (astronomio): S-ro Clement Hickey, inspektisto, P.O. Box 23, Annandale.

Belgujo

Astene (Oost-Vlaanderen) D: S-ro Maurice Vanderlinden, instruisto, Dorp 44.

Brazilo

Rio de Janeiro (Distrito Federal) FD (bibliotekoj): S-ro Jorge Campos de Oliveira, oficiro, Rua Hadock Lobo 320 ap. 502.

Britujo

Romford (Essex) FD (poŝto): Vakas.

Bulgario

Kubrat FD (medicino): Vakas.

Ĉeĥoslovakujo

Lanzhot (Morava) D: S-ro Fran Svaĉina, instruisto, okr. Breclav.

Danlando

Aarhus (Jylland) FD (fervojo): S-ro Robert Mikkelsen, fervoja-laboristo, Hammershusvej 36.

Finnlando

Laihia (Vaasan lääni) FD (kristanismo): Vakas.

Puumala (Savo) FD (kontraŭalkoholismo): S-ro Alpo Suomalainen, eksinstruisto, Kitula.

Francujo

Bischwiller (Bas-Rhin) D.: Vakas.

Grenoble FD (turismo): S-ro Augustin Ploussy, komercisto, 23 Rue Maurice Barrès.

Germanujo

Berlin JD: Vakas.

Dresden (Sachsen) D: D-ro Hans Groh, dentkuracisto, Neuländerstr. 7.

Freiberg (Sachsen) D: S-ro Erich Hölscher, eksstudkonsilisto, Sachsenhofstrasse 10.

Konstanz (Baden) D: Vakas.

Leipzig JD: F-ino Anita Pannicke, bankoficistino, Kolmstrasse 1.

Münchberg (Oberfranken) D: S-ro Franz Knobloch, kontisto, Jägerstr. 6.

Münster (Westfalen) FD (filatelo): S-ro Werner Flick, dungito, Antoniusstrasse 39 III.

Werl Krs. Soest (Westfalen) D: Vakas. FD (filatelo): Vakas.

Greklando

Volo (Magnisia) FD (turismo): F-ino Heleni Polimeropulu, profesorino, Franca Instituto, Gallias 56.

Hispanujo

Barcelona D: S-ro Rafael Ayala Gómez, komerca agento, Avda. Gmo. Franco 243, 4°, 1a.
VD: Vakas.
FD (instruado): Vakas.
FD (librokomerco): Vakas.
FD (muziko): Vakas.
Madrid FD (virinaj aferoj): Vakas.
Palma de Mallorca (Baleares) FD (aeronaŭtiko): Vakas.
Valencia D: Vakas.

Irlando

Cóbh (County Cork) JD: S-ro Anthony Pratschke, studanto, 2, Wellington Place.

Italujo

Cortina d'Ampezzo (Belluno-Veneto) D: Prof. D-ro Carlo Agostini, gimnazi-estro, Scuola Media Statale.
Verona D: S-ro Franco Galbusera, oficisto, Vicolo Ghiacciaia 6.
VD: S-ro Giannantonio Fiorini, oficisto, Via Zaccaria Betti 2.

Izraelo

Tel-Aviv D: Vakas.

Japanujo

Nagasaki (Kyusyu) D: S-ro Ken Takahara, kuracisto, Ginyamati 56.

Jugoslavio

Celje (Slovenija) D: S-ro Ivan Jazbec, remburisto, Vilharjeva 4.
Split (Dalmacija) FD (dentistaj aferoj): S-ino Ata Vitic, dentistino, Poljana 27 marta 1941 7b.
Subotica (Vojvodina) D: S-ro István Tóth, oficisto, Karadjordjev put 43.
FD (komerco): La D.

Nederlando

Arnhem FD (agrikulturo kaj agrikulturaj leĝoj): S-ro Evert J. Woessink, direktoro de oficejo por farmistoj, Vondellaan 47.
Scheveningen D: Vakas.
Zwijndrecht D: S-ro Jan Melger, komerckorespondanto, Van Ostadestr 14.
Wassenaar FD (turismo): S-ino Agnes Sinnema, instruistino, Oostdorperweg 88.

Norvegujo

Bergen VD: S-ino Majken Wagle-Jörgensen, piano-instruistino, Jomfrustien 7.
FD (industrio): S-ro Johan Matland, inĝeniero, Bekkesvingen 3.
FD (muziko): S-ino Jenny Jahren, kant-instruistino, Skivebakken 42.
Korgen (Nord Norge) D: S-ro Arne Mjøen, butikestro.
FD (muziko): S-no Jenny Jahren,
Oslo FD (ŝipkonstruado): Vakas.

Pollando

Bialystok FD (teatro kaj literaturo): Vakas.
Bielsko-Biala D: Vakas.
Bochnia (Polska Południowa) D: S-ro Jan Piotrowski, oficisto, str. Wegierska 24.
Kraków-Nowa Huta (Maopolska) D: S-ro Stefan Dropiowski, studento, Skrytka Pocztova Nro 36.
Rzeszów D: S-ro Roman Wulczek, oficisto, ul. Poniatowskiego 3.
Warszawa FD (filatelo): S-ro Witold Majewski, super-inspektoro de ŝtata entrepreno por filatelo, ul. Zabkowska 27/31 m. 10.
FD(komerco): S-ro Witold Majewski, super-inspektoro de ŝtata entrepreno por filatelo, ul. Zabkowska 27/31m.10.

Portugalujo

Marinha Grande (Ekstremaduro) D: Vakas.
FD (naturismo): Vakas.

Usono

Lillie (Louisiana) D: Vakas.

MEMBROJ SUBTENANTOJ 1958

315 Pich, S-ro Jozefo, Kaltenleutgeben, Aŭstrujo.
316 Wick, S-ro Rudolf, Pöls ob Judenburg, Aŭstrujo.
317 Atkinson, S-ro G. B., London, Britujo.
318 Blacklock, S-ino L. E., Parkstone, Britujo.
319 Garraway, F-ino E., Sheffield, Britujo.
320 Guise, S-ro W. C., Rugby, Britujo.
321 Roome, S-ro G. W., Sheffield, Britujo.
322 Smith, S-ro Norman R., Davyhulme, Britujo.
323 Schleicher, S-ro Ib., København, Danlando.
324 Crochet, S-ro M., Epernay, Francujo.
325 Keller, S-ro Ad., La Celle-St.-Cloud, Francujo.
326 Philippe, S-ro H., Arras, Francujo.
327 Sayous, S-ro P., La Ribere par Auch, Francujo.
328 Bepperling-Wolf, S-ino A., Wetzlar, Germanujo.
329 Brückner, S-ro Max, Stolberg, Germanujo.
330 Dahlmann, S-ro Erich, Berlin, Germanujo.
331 Epstein, S-ro Felix, Hamburg, Germanujo.
332 Gründler, S-ro M., Frankfurt, Germanujo.
333 Hauber, S-ro R., Bad Aibling, Germanujo.
334 Iffländer, S-ino Elisabeth, Reichersbeuern, Germanujo.
335 Jolliet, S-ro Leo, Wiesbaden, Germanujo.
336 Rosenstengel, S-ino Käte, Nordhorn, Germanujo.
337 Wuenschel, S-ro Hans Ph., München, Germanujo.
338 Boscarino, S-ro Avv. G. S., Ragasu, Italujo.
339 Pacelli, Prof. Giuseppe, Pisa, Italujo.
340 Nurra, S-ro Gavino, Carbonia, Italujo.
341 Viti, S-ro Giulio, Messina, Italujo.
342 Šaponjic, S-ro Inĝ. M., Beograd, Jugoslavio.
343 Volkanoska, S-ino Aleksandra, Skopje, Jugoslavio.
344 Hoekma, S-ro A., Den Haag, Nederlando.
345 Jung, S-ro Teo, Scheveningen, Nederlando.
346 Thorvaldsen, S-ino E., Oslo, Norvegujo.
347 Clarkson, S-ro R. J., Tauranga, Novzelando.
348 Villanueva, S-ro Ulpiano, Lima, Peruo.
349 Sakowicz, S-ro Roman, Nowa Sól, Pollando.
350 Grutter, S-ino L., Samedan, Svislando.
352 Kuhn, S-ro G., Zürich, Svislando.
352 Roth, F-ino Frieda, Solothurn, Svislando.
353 Mijálov, S-ro Serguei, Montevideo, Urugvajo.
354 Ballard, D-ro Francis E., Reseda, Usono.
355 Buchheim, S-ro Walter A., Denver, Usono.
356 Rogus, S-ro Andrew I., Miami, Usono.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Piron, S-ro Claude, New York, Usono.
Pot, S-ro C., Slikkerveer, Nederlando.

DONACOJ AL LA ĜENERALA KASO

J. Jungton, Usono, 4.94 gld.; N.N., Aŭstralio, 7.88 gld.
Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.

FONDAĴO-ZAMENHOF

Antaŭa sumo: 650.96 gld.

Novaj kontribuoj: S-ino A. Meurrens, Belgujo, 7.60 gld.; H. Lachmund, Germanujo, 6.33 gld.; W. Auld, Skotlando, 20.— gld.; A. H. den Boer, Nederlando, 5.— gld.; S-ro E. Tison, Francujo, 41.50 gld.; N. N., Nederlando, 10.— gld.; D-ro Viktor Melzer, Germanujo, 0.94 gld.; H. V. Rasmussen, Danlando, 5.46 gld.; N. N., Nederlando, 30.— gld.; D-ro A. Albault, Francujo, 8.30 gld.; Grupo Angevin, Francujo, 16.60 gld.; F. Lemmonier, Francujo, 16.60 gld.; G. v. Heek, Nederlando, 10.— gld.; S-ro Dragsted, Danlando, 5.45 gld.; „Kolektu konstante kie ajn", 10.— gld.; Jan Strönne, Svedujo, 11.02 gld.; R. Slot, Nederlando, 10.— gld.; Ned. Esp. As. L.E.E.N., sekcio Deventer, 15.— gld.; Esp. Societo „Bude Borjan", Jugoslavio, 10.80 gld. Entute 891.56 gld.

Malavare kontribuu por ĉi tiu nobla celo!

M. H. VERMAAS'

Direktorino C.O.

Koresponda Servo Mondskala. Nuntempe, multaj adresoj haveblaj el Estonio, Francujo, Pollando, Japanujo, Jugoslavio, Bulgario. Skribu indikante viajn sekson, aĝon, profesion al: Daniel Luez, Laon (Aisne), Francujo, kaj enmetu respondkuponon por ĉiu petata korespondanto.

Por restarigo de esperantista lernejo ni bezonas a) infanojn, b) domon, c) monon. Ni malsukcesis nur pro manko de infanoj, kiujn ni nun serĉas unuavice. Grupoj kaj fakasocioj, diskutu kaj skribu al S-ro Smith, Hilltop Farm, Brighton Road, Crawley, Sussex, Britujo.

La plej granda vesperĵurnalo de Svedujo „Aftonbladet" publikigas senpage korespondpetojn de eksterlandanoj. Indiku aĝon, sekson, deziratan korespondtemon! Adreso: Ett Ögonblick redaktörn, Aftonbladet, Vattugatan 12, Stockholm 1, Svedujo.

Ferio en Nederlando de la 24-a de aŭgusto—la 1-a de septembro. Gastloĝado ĉe samideanoj en Haarlem kaj Alkmaar. Kostoj (por ekskursoj) 50.— gld. Petu senpagan informilon ĉe S-ino E. Dijkema-de Groot, Westerweg 91, Alkmaar, Nederlando.

D-ro Karlo Szabó, Jókai-u. 2, Nagukörös, Hungarujo, 45 jara. Esp. de 1928 deziras korespondadi pri ĝeneralaj temoj, tamen precipe pri amatora fotografado. Interŝanĝu esp. glumarkojn kaj Esp. pm. eldonaĵojn kontraŭ hungaraj. Afranku filatele!

Por gekursanoj 16 ĝis 40-jaraj mi serĉas gekorespondantojn. K. Dolĉinkov, Tirnovo, Bulgario.

Ŝat. kor. kun Esp-inoj el tuta mondo cele eventualan estontan geedziĝon. D. Goeres (22-jara), (22a) M. Gladbach, Postfach, Germanujo.

Adolf Tluczkiewicz, Wspolna 7, Radom, Pollando, deziras korespondi per bildkartoj kaj interŝanĝi pm. kun la tuta mondo.

Filatelisto, arkitektura studento, S-ro Carlos Escudé, Strato Calvo Sotelo 77, Tarrasa (Barcelona), Hispanujo, deziras interŝanĝi poŝtmarkojn kun la tuta mondo.

Per libervola laboro L.I.C.S. starigos denove dum la somero, laborkampojn en multaj landoj. Informoj vi ricevos de S.C.V.I., 77 Boulevard Jean Jaurès, Clichy (Seine), Francujo.

18-jara studento deziras korespondi kun ne-eŭropaj landoj per bildkartoj, pri diversaj problemoj kaj interŝanĝas poŝtmarkojn. Stanislaw Trajdos, Lódz, Zamenhofa 16 m. 7, Pollando.

Deziras amikojn en Eŭropo, Japanujo kaj arabaj landoj, pli aĝajn ol 25 j. Temoj: kulturaj, folkloro kaj muziko. Teresito Garzon, Guemes 1/69, La Carlota, Argentino.

Bulgaraj gekursanoj deziras korespondi kun ĉiuj landoj pri ĉiaj temoj. Respondo garantiata. Kursgvidanto: Georgi Simeonov, Str. Baba Kuba 15, Vidin, Bulgarujo.

Sendu poŝtmarkojn de via lando, ni ŝanĝos kontraŭ egalkvanto da belgaj. Leon Lagrou, Bloemeke 344, Beernem, Belgujo. Respondo garantiata.

Sendu poŝtmarkojn de via lando, ni ŝanĝos kontraŭ egalkvanto da belgaj, aŭ cigaroringoj, aŭ alumetetikedoj laŭvole. Gilbert Vandewiele, St. Amand, Beernem, Belgujo.

Jen unika bonŝanco. Se vi estas katolika junulino minimume 18-jara, se vi flue parolas esperanton, se vi lernis la francan lingvon kaj deziras plibonigi vian scion per ĉiutaga praktiko, vi povas gastiĝi dum pluraj monatoj ĉe belga franclingva familio, kondiĉe ke vi pretu helpi en la mastrumaj taskoj. Se ĉi tiu propono interesas vin, bonvolu tuj skribi, kunmetante kompletan vivrakonton, freŝdatan portreton kaj laŭeble ateston de UEA-delegito pri via esperanto-lingvokapablo parola, al: G.P./E., pere de Espéranto-Office, 18, rue de Franquenies, **Ottignies**-Brabant, Belgujo, kiu transsendos.

Interŝanĝas infandesegnaĵojn tutmonde Profesoro Toth László, Sztálinváros, Esze Tamás-utca 9, Hungara Popolrespubliko.

Interstena materialo troviĝas en London, Köln, Bristol, Narbonne, Brussel, Malmö, Barcelona, Varazdin, Warszawa, Nara, Downers Grove (Ill. Usono), Buenos Aires, Belo Horizonte ktp. Tie malkarege oni povas aboni „Intersteno"-n; 4 eksterlandaj leterafrankoj ĉe la Peranto.

Ĉirkaŭ 16 novaj geesperantistoj deziras korespondi tutmonde pri diversaj temoj. Ni povas interŝanĝi librojn, bildkartoj k.a. Respondo garantiita. Peranto: Nikolaj Pârvanov Kolarovgrad, ul. M. Simeon 16, Bulgarujo.

Pri nacia standardo deziras korespondi kun diversaj nacianoj, Kumamoto-Esperanto-Societo, ĉe S-ro Tsuruno Kyomachi 2-chome, Kumamoto-shi, Japanujo.

Preta servo por grekaj filatelaĵoj sub favoraj kondiĉoj. Petante informon aldonu respondkuponon. Alkis Georgandelis, Plomari (Lesbos), Grekujo.

La 1-an de majo 1958 aranĝos Esperanto-rondeto ĉe Kleriga kunularo en Havírov solenan letervesperon. Ni Esperantistoj de la unua socialisma urbo Havírov volas tiel glorigi la 1-an de majo — la festotagan de ĉiuj laboruloj. Ĉiu, kiu skribos al ni, ricevos belan vidaĵkarton de nia nove konstruita, socialisma urbo. Skribu al rondetestro: Oldrich Schwetter, Havírov 1, blok 14/67, Ĉeĥoslovakujo.

Pola geedziga oficejo „Swtka" havas kiel celon (speciale por geesperantistoj) feliĉege helpi al soluloj kaj diskrete kunigi esperantistaj geedzojn. Ni havas kandidat(in)ojn el pli ol 10 landoj laŭ dezire. Skribu sekson, aĝon, intereson. Aldonu eble rpk al „Swatka", Lódz, Piotrskowska 133, Pollando.

Letervesperon aranĝas la Esperanto-Societo „Radio" en urbo Pazarĝik, str. Ivan Sekelev 4, Bulgario (K. D. Kostantinov) je 24.IV.58. Al ĉiuj kontribuantoj ni sendos belan vidaĵon de nia urbo, aŭ rekompencos per faldfolio pri nia lando.

Nova gramofondisko en Esperanto (17 cm), mikrokanela, nerompebla: „La Espero", „Ĉeriz' Tempo" (franca), „Al la Fontano Klara" (kanada), „Adiaŭ" el Schubert (germana). Kanto kaj piano Marguérite Santreuil, Y. Mathy. En luksa koverto „verda" kun portreto de D-ro Zamenhof. La mendojn oni sendu al „Diskok Oceana Pordo", 21 Str. Berne, Paris 8, Francujo. Poŝtkonto II 652-37 Paris.

Mi serĉas sciigojn pri gesamideanoj Henri Moreaux (Francujo) kaj Ilka Figueria (Brazilo) kaj aliaj miaj antaŭaj amikoj. Andreo Grebecki, Warszawa 90, Dusznicka 63, Pollando.

Kun junaj gesciencistoj precipe biologoj korespondu Andreo Grebecki (protozoologo) kaj Wanda Grebecki (plantfiziologistino), Warszawa 90, Dusznicka 63, Pollando.

Turismo. Oni interrilatas seriozajn fakulojn pri organizado de turistkaravanoj en Sovietlandoj, Japanujo, Jugoslavio, Portugalujo. Deziratai turistprospektoj, hotelinformoj, prezoj. Lertaj esperantistoj rekompensotaj. Angelo Lovati, Ufficio Studi Comitbanka, Milano (Italio).

Ministoj. Sendu poŝtmarkojn kun motivoj pri minado, mineksploatado ktp. Mi sendos interŝanĝe hungarajn poŝtmarkojn. Al landoj nehavantaj priminajn poŝtmarkojn mi volonte havigas teknikajn klarigojn por preparo de tia eldono. Mi korespondadas ankaŭ pri minoksploatado, minojaferoj ktp. Gustav Csaszlava, inĝeniero, Budapest V., Bajcszy Zs. - ut 19/a. (Hungarujo).

Korespondantojn serĉas: Leger Bernhard, fervojisto, Alter-Postweg 5; Krüger Hans, fervojisto, Alter-Postweg 7; Friedrich Erich, fervojisto, Langstr. 39; Bünger Ingeborg, fraŭlino, Hardtstr. 80; Schumm Hermann, lernanto, Goldbacherstr. 10; Barthel Dieter, lernanto, Beyerlbacherweg 19; Welzel Rolf, lernanto, Ludwigstr. 21; Bauer Hugo, pakmajstro, Schönebürgstr. 15; Gscheidle-Katz Gudrun, redaktorino, Schiessbergstr. 40; Vogelmann Hartmut, studento, Poŝtkesto 39; Jossen, Studienrat Gymnasium; Baumann Inge, fraŭlino, Poŝtkesto 39. Urbo: Crailsheim-Germanujo.

Por universala amikeco - per korespondado kaj interŝanĝo: bonvolu anonci senpage en dumonata organo de „universala Amikeco", Box 1960 R, G.P.O. Melbourne, Aŭstralio. Jara membropago: Us. dol. 1 (7 angl. ŝil.). Nestampitaj p.m. akceptataj.

Kvar 17-jaraj knabinoj deziras korespondi kun la tuta mondo. Alskribu per ilia instruisto: Kalistrat Manĉev, Lehĉevo, Mihajlovgrad, Bulgario.